

Turka Stelo



SALUTON,

Jam estas februaro. Kaj ni jam enprofundiĝis en vintron. Istanbulo ricevis tro da neĝo lastatempe kaj la etoso estis ĥaosa. Preskaŭ ĉiuj insuloj de la Egeo kaj ankaŭ la ĉefurbo Ateno en Grekio ricevis pli ol la atendita neĝo ĉi-jare.

Jen Turka Stelo, revuo por vi, kiun vi legos interne en la varma etoso de via hejmo, spektante la neĝon ekstere. Estas tre interesaj artikoloj en ĝi, kaj ĉiu trovos kelkajn interesajn artikolojn por si.

La versio Omikrono de la viruso Kovim furoras ekstere. Oni diras, ke ĝi ne estas tiom danĝera kiel la pasintaj versioj sed tamen la kazoj pli kaj pli altiĝas kaj ĝi estas danĝera almenaŭ por tiuj, kiuj superas la aĝon de 60 kaj kiuj eble havas sanajn problemojn. La vakcinoj ne estas tiom sukcesaj kontraŭ Omikrono kaj novaj versioj venos baldaŭ.

Oni nun parolas pri la AB.2 mutacio de la viruso, kiu tute eskapas de la vakcinoj kaj oni diras, ke ĝi

ankaŭ povas kaŝi sin de la testoj.

Ni esperu, ke la viruso mutacios al iu versio, kiu ne plu estos danĝera kaj forlasos nin trankvilaj. Same tiu de gripo.

Sed tamen la monda populacio estas tiom alta kaj en kelkaj partoj de la mondo la populacio estas tiom densa (ekz. Barato, Bangladeŝo, Ĉinio ktp), ke oni timas, ke eble alia viruso ekaperos kaj trafos nin.

Ni esperu la plej bonan por ni. Sanon kaj kuraĝon al ĉiuj en la pandemia tempo.

Bonan legadon al ĉiuj !

Enhavtabelo

| | |
|---|----|
| Malfermo | 1 |
| Enhavtabelo | 2 |
| Kursoj | 2 |
| Vakciniĝu | 2 |
| Internacia tago de la gepatra lingvo | 2 |
| Sumoo | 3 |
| UEA | 3 |
| TEJO | 3 |
| Leteroj de niaj legantoj | 4 |
| Scienca Kalendaro 2022 | 4 |
| Tempo Sigelita | 5 |
| CIRENA - ARISTEO (ΚΥΡΗΝΗ - ΑΡΙΣΤΑΙΟΣ) | 6 |
| Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo | 9 |
| El la literaturaj paĝoj de MAS | 10 |
| Du knaboj | 13 |
| Meĥanikisto Robert | 13 |
| Misteroj - Elpensita aŭ vera? (4) | 14 |
| La Polino - parto 4 | 15 |
| La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj (10) | 17 |
| La turka tombejo en Malto | 19 |
| En iu vilaĝo aŭ E-viruso | 20 |
| Feliĉe kaj kontente | 21 |
| Sovaĝaj olivarboj en Cluj / Kolozsvár | 22 |
| Kalendaro 2022 (sur unu paĝo) | 22 |
| Luno, La patrino | 22 |
| Ŝercoj | 23 |
| Krucvortenigmo | 23 |
| Esperanto: lingvo nur principe ĝena por kapitalistoj kaj imperiistoj (parto 5) | 24 |
| EKRA 2021 - Humuraĵoj - Revulo | 25 |
| VORDONIS! La prao de vivo (1) | 26 |
| La Eta Strategiisto | 26 |
| Kataj historioj | 27 |
| "HRISTO GOROV-HRIMA" – 2022 | 27 |
| KOKI | 28 |
| Blankaj februaraj floroj | 29 |
| Du Eraroj | 30 |
| Italio kaj vi | 31 |
| Solvo de la krucvortenigmo | 31 |
| Facilaj rakontoj | 32 |

Kursoj



Ĉe Burdur Mehmet Âkif Ersoy Universitato okazas Esperanto-lingvokurso nome "Esperanto Dili" kiel oficiala registrita universitata kurso elektebla de studentoj el diversaj fakultatoj. La kurson gvidas la unversitata matematika instruisto Utku Gürdal. Al la kurso aliĝis 15 studentoj.
<https://edukado.net/kursejo?kid=27360>

Vakciniĝu



Internacia tago de la gepatra lingvo



Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



Sumooj en la jaro 2022

januara sumoo: de la 9a ĝis la 23a de januaro

marta sumoo: de la 13a ĝis la 27a de marto

maja sumoo: de la 8a ĝis la 22a de majo

julia sumoo: de la 10a ĝis la 24a de julio

septembra sumoo: de la 11a ĝis la 25a de septembro

novembra sumoo: de la 13a ĝis la 27a de novembro

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

UEA



N-ro 1007 (2022-01-03)

Unueco, espero, amikeco: nia vojo en 2022, bondezira mesaĝo de UEA

Unueco, espero, amikeco: jen vortoj, kiuj bone difinas la laboron de UEA kaj per kiuj la Asocio sincere bondeziras al ĉiuj homoj. [...]

N-ro 1008 (2022-01-18)

Mesaĝo de UEA, ILEI kaj TEJO al Unesko kaj Unuiĝintaj Nacioj okaze de la Internacia Tago de Edukado, 24 januaro 2022

“Edukado estas la vojo el malriĉo kaj la fundamento por pli bona estonteco” – tiel diras unu el la multaj organizoj, [...]

N-ro 1009 (2022-01-20)

Eli Urbanová: 100 jaroj da ĉeesto, 10 jaroj da sopiro

En 2022 UEA memoras 100 jarojn da ĉeesto kaj sopiras pro 10 jaroj de la forpaso de Eli Urbanová. Ĉeĥa poetino, kiu [...]

N-ro 1010 (2022-01-21)

Mesaĝo de UEA okaze de la Tago de Holokaŭsta Memoro, 27 januaro 2022

Ĉiujare, la 27-an de januaro, Unuiĝintaj Nacioj observas la Tagon de Holokaŭsta Memoro. [...]

N-ro 1011 (2022-01-23)

Staĝado ĉe Unuiĝintaj Nacioj: informo de la Novjorka Oficejo de UEA

La Novjorka Oficejo de UEA informas, ke en la kunteksto de la kreado de la unua Strategia Politika Kadro pri Multlingvismo de la [...]

TEJO



(2022-01-06)

Membrigu en TEJO!

Iĝu parto de nia tutmonda komunumo! Se vi aĝas ne pli ol 35 jarojn – membrigu en TEJO! Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la Revuon Kontakto kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en... [...]

(2022-01-11)

Eblas nun voĉdoni por novaj komitatanoj B

En la nuna Komitato de TEJO, oficanta de 2020 ĝis 2022, estas loko por kvin komitatanoj B, sed nur tri postenoj estas okupitaj nun. Laŭ nova regulo en la Reglamente pri elekto de Komitatanoj B tio signifas, ke devas... [...]

(2022-01-13)

TEJO serĉas partnerojn por novaj Erasmus+ projektoj

Nuntempe la estraro de TEJO pretigas proponojn por projektoj de la fonduso al Erasmus+. Ili estas plurcelaj: ni volas faciligi la renkontiĝadon, provizi interesajn trejnadajn por ni junaj Esperantistoj kaj ankaŭ ke tia lernado utilas por kaj nia movado... [...]

(2022-01-22)

Malferma alvoko por trejnistoj, “Diversa, sed Egala”

La Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) kunlabore kun la Konsilio de Eŭropo (KdE) organizas la trejnadon ‘Diversa, sed Egala: Edukado de Junuloj pri Intersekcio Aliro’. La trejnado donos la eblon al 20 aktivaj NFE-trejnistoj kaj edukistoj de membroŝtatoj de... [...]

Leteroj de niaj legantoj



Estimataj samideanoj, novajn ideojn, bonajn sukcesojn en la nova jaro 2022.

Mi elkore dankas pro la sendita januara numero de Turka Stelo.

Ĝi kiel ĉiam estas ampleksa, enhavoriĉa, alloga kaj interesa, kiun mi legas kun granda plezuro.

Hodiaŭ mi sendas al legantoj de TS mian novan humuraĵon pri esperantistoj.

Ĝuu ĝin se vi trovos ĝin interesa.

Amike,


Laimundas Abromas el Litovio



Karaj, ne nur por mi, la lasta numero de Turka Stelo venas ankaŭ kiel donaco bela por la nova jaro! Dankon! Mi disdonas ĝin ankaŭ al niaj amikoj en kaj eksterlande. Ĉi foje mi sendas intervjuon kun Kosova anekdotisto, cetere amiko mia. Ĉar tio estas longa, vi povus aperigi eble nur ties partojn. Aparte la anekdotoj en la fino. Ĉu?

Via,

Bardhyl Selimi el Albanio



Koran dankon pro la sendado de la lasta Turka Stelo

Havu sanan sukcesan jaron 2022, multe da

inspiro por via revuo.

Mi havos pli da tempo por ĝin legi ĉar pro novaj limigoj kaŭzita de Kovid (ĉirkau 100 000 kazoj en Njusautvelo - New South Wales) mi devis nuligi mian vojaĝon al Sidnejo cele ĉeesti la esperantan somerkursaron. Ĝi okazos nur per zoom. Do mi restos en Melburno.

Amike,

Franciska Toubale el Aŭstralio



Multajn dankojn kara pro TS.

Bonegan 2022-an jaron al vi, al la redaktoro de via ĉiam bonega eldonaĵo kaj al ĝiaj legantoj.

Adri Pásztor el HUNGARIO



Karaj,

Koran dankon pro la publikigo de mia letero kaj la daŭrigo de "Glano". Mi estus dankema, se mia malgranda versaĵeto povus lokiĝi en la februara numero de via revuo. Sukcesojn en via nobla laboro.

Estime

Antanas Vaitkevičius, Litovio

Scienca Kalendaro 2022

Saluton,

Jen bona jarkomenca novaĵo: la scienca lerneja kalendaro de la Supera Konsilio por Scienca Esplorado de Hispanio (CSIC), havas version en Esperanto en la jaro 2022!

La kalendaron oni povas trovi en la adreso: <https://digital.csic.es/handle/10261/256432> (kaj ankaŭ en la HEF-a Bitoteko). La oficialan prezentadon oni faros verŝajne la 11-an de januaro, sed la materialo en Esperanto jam ekaperis de la komenco en la tŭitera konto de la iniciato: <https://twitter.com/CalCientifico>, kaj ankaŭ en la propra konto: <https://twitter.com/SciKalendario>.

La kalendaron akompanos Didaktika Gvidilo, ankaŭ en Esperanto, utiligebla por ke instruistoj povu ĝin utiligi en lernejoj.

La kalendaro ekzistas en versioj en la hispana, galega, astura, kataluna, aragona, eŭska kaj angla lingvoj kaj de tiu ĉi jaro ankaŭ Esperanto, la franca kaj la araba. Pri la esperanta tradukado zorgis teamo kunordigita de Hispana Esperanto-Federacio.

Specimenon de la aspekto vi povas vidi en apuda bildo.

Pliaj informoj venos post la oficiala prezentado, sed dume vizitu: <https://twitter.com/SciKalendario> kaj ĝuu ĝin.

José Antonio del Barrio

Fundación Esperanto

<http://www.esperanto.es/fundacion/>



MERYL

De Joanna Kramer al prezidantino Orlean

“Kion ajn vi faras, vi devas fari ĝin en daŭra maniero. Ĉi tio estas leciono, kiun mi lernis de mia edzo. Li diras: ‘Daŭru! Komencu per komenco!’ ”



Mi spektis Meryl Streep en ŝia franca parolado dum ŝi ricevis la honoran premion ĉe la Cezara

Ceremonio en 2003 kaj miregis. Tre fama usona aktorino parolis la francan, kaj tio surprizis min. Pli poste leginte ŝian biografion, mi eksciis, ke Streep parolas plurajn lingvojn kaj povis imiti malsamajn akcentojn. Ekzemple, ŝi imitis polan enmigrintan knabinon en "La Elekto de Sophie". Dekoj da francaj aktoroj kaj eŭropaj reĝisoroj aplaudis ŝin starante, kiam ŝi venis al la scenejo. Juliette Binochet ploris. Kiam ŝi aperis sur la scenejo, ŝi salutis ĉiujn metante sian dekstran manon sur sian koron. Ĝi estas manmovo, kiun kutime faras niaj turkaj teatraj aktoroj. Ili kore salutas la aplaŭdojn. De tempo al tempo ŝi rigardis la notojn en la papero en ŝia mano kaj de tempo al tempo ŝi parolis improvize. Kaj ŝi estis tre natura. Same kiel en siaj filmoj. Ŝia ekscito kaj sincereco elfluis de la scenejo al la spektantoj. Mi aprezis ŝin denove.

Mi ankaŭ laŭdas ŝin pro tio, kion ŝi diris ĉe la 74-a Ceremonio de la Ora Globo Premioj:

“La tasko de aktoro estas eniri la vivojn de malsamaj homoj ol ni kaj sentigi ilin. Estis tiom da impresaj, potencaj aktoradoj ĉi-jare. Estis aktorado, kiu



mirigis min ĉi-jare. Ĝi trafis min en la koron. Sed ne ĉar ĝi estas bela. Estis nenio bela pri ĉi tiu aktorado. Sed ĝi estis

efika kaj plenumis sian laboron. Ĝi ridigis la publikon (Rilatante al Trump). La persono, kiu devus sidi en la plej respektata sidloko en nia lando, parodiis handikapitan raportiston, kiu ne povis konkuri kun li. Ĉi tio dolorigis mian koron. Mi ne povas forigi tiun ĉi bildon de mia menso ĉar ĝi ne estis en filmsceno. Ĝi estis reala vivo. La fakto, ke iu, kiu devas esti rolmodelo, potenca, kaj influas ĉies vivon, kiam faras

ion tian, donas al aliaj homoj la rajton fari ĝin ankaŭ... Malrespekto alvokas malrespekton. Perforto nutras perforton. Se la potenculoj uzas siajn poziciojn por subpremi aliajn, ni ĉiuj perdas. Ni bezonas respondecan gazetaron, kiu limigos potencon kaj kritikos ilin kiam ili estas koleraj. Tial la fondintoj de nia lando metis la gazetaron en sanktan lokon kaj donis al ĝi liberecon en la konstitucio. Mi invitas la riĉan hollywoodan gazetaron aliĝi al ni por protekti ĵurnalistojn. Ĵurnalistoj bezonas nin.”

Meryl Streep portretis multajn karakterojn, de la dispremita, ŝanceliĝanta, mem-identiganta etburĝa virino en la filmo “Kramer Kontraŭ Kramer” ĝis la

impertinenta, oportunistisma prezidanto Orlean en “Don't Look Up (Ne rigardu supren)”. Foje kun kompleta



ŝminkoŝanĝo, foje kun ŝanĝo de harkoloro. Sed antaŭ ĉio, kiel aktorino, uzante sian psikologian materialon kiel skulptisto... En la vera rakonto de Florence Foster Jenkins, la fama heredantino kaj maljuna virino, kiu revis fariĝi operkantisto sed ne povis atingi tion pro sia malbona voĉo, ĝis ia sorĉistino en la filmo “The Woods (La Arbaro), ĝis en tiu eleganta amo-filmo nomita “The Bridges of Madison County (La briĝoj de Madison Distrikto) en la karaktero de Francesca Johnson, iu nesatigebla virino en sia geedziĝo, kiu travivis amon unufoje sed ne povis riski tion kaj denove elektis sian komforton... En la vortoj de la turka filmkritikisto Atila Dorsay : “... kaj ŝi pasis de identeco al identeco kiel kameleono ...”

Meryl Streep, kun teatra deveno, havis grandan sukceson sur scenejo, sur la blanka kurteno kaj ankaŭ en televido. Ekzistis ankaŭ kritikistoj de kelkaj el ŝiaj aktoradoj. Sed tio, ĉiam estas tiel, kiel ŝi iam diris: “Ĉio pasas, aktorado restas.”

Kaj en iu intervjuo, ŝi parolas pri si kiel jene:

“Esti amata, interesata kaj admirita estas ĉiuj mirindaj aferoj. Tamen, ĉiuj tiuj ne devas preterpasi vian normalan vivon. Ekvilibro estas tre grava por mi. Ĝenerale mi tute ne ŝatas spekti min. Se mi filmas, mi ne spektas ĝin post kiam ĝi estas finita krom se ĝi estas necesa. Mi preferas spekti ĝin en la premieroj. Tio estas en la publikigita formo de la filmo.

Foje, kiam mi estas hejme kaj spektas televidon >>>30

Ĉu vi voĉdonas por la vino aŭ por la mielo? Se vi devus elekti unu el tiuj ĉi du bonaĵoj, kiun vi preferus?

Mi metas la strangan demandon, al kiu mi mem ne povas respondi, nur ĉar ĝi koncernas la heroon de tiu ĉi mia rakontado.



Tamen mi ekiru de la komenco:

Hipseo (Υψεύς), la reĝo de la Lapitoj (Λαπιθῆαι), militema gento loĝanta en Tesalio (Θεσσαλία), havis filinon, kiu estis nomata Cirena.

Tiu Cirena estis tre bela kaj bonkora, reĝdece edukita junulino, tamen ŝi estis iom stranga, precipe laŭ tio, ke ŝi ŝatis tre multe la kamparon. Pro tio ŝi deziris vivi en la libera naturo, okupiĝi pri aferoj kaj laboroj rilataj al la kultivado, la brut-bredado, la ĉasado, pri ĉio simila. Ŝia patro, kiu posedis agroj kaj abundajn gregojn da diversaj bestoj, permesis al ŝi vivi malproksime de la palaco, kaj okupiĝi pri la administrado de lia ter- kaj brutposedaĵo. Tiel, ŝi pasigis agrable sian tempon en sia amata medio, plej multe sur la deklivoj de la monto Peliono (Πήλιον).

Ŝi aspektis delikata, sed, hardita de la pezaj, penigaj okupoj de la kamparo, ŝi estis korpe tre forta. Tiel, kiam, unu matenon, ŝi malproksimiĝis de sia restadejo, ĉasante en densa loko de arbaro, renkontis junan leonon, ne teruriĝis. Ŝi provis kviete malproksimiĝi, sed kiam la besto sin ĵetis sur ŝin, ŝi kuraĝe luktis kun ĝi, kaj ŝi sukcesis ĝin mortigi.

Ekzakte tiun momenton ekvidis ŝin de malproksime la splenda dio Apolono (Απόλλων), kiu, en la daŭro de unu rigardo forte ekamis ŝin. Tamen, la dio ne tuj prezentiĝis al ŝi, li unue aliris al Kirono (Χείρων), la saĝa centaŭro al kies scioj kaj konsiloj eĉ la dioj rifuĝis. La saĝa majstro, kies restadejo estis ekzakte tie, sur la monto Peliono, bone sciis kiu kaj kia estas la bela virino kiun la dio ekamis. Do, li konsilis Apolonon senhezite kuniĝi kun ŝi, kaj ĉar krom ĉio alia

li estis la plej bona kaj kompetenta aŭguristo, li antaŭvidis, ke el la kuniĝo elvenos neantaŭvidebla bono por la tuta homaro. Li antaŭvidis, ke la bela Cirena iĝos la unua kreinto - fondinto de lando nova, belega, kun netakseble prospera kaj glora estonteco. La saĝa centaŭro antaŭvidis ankaŭ, ke la frukto de la kuniĝo alportos al la mondo de la homoj nesupozeblan utilon.



Kaj estis ne nur la kuraĝigaj antaŭvidoĵoj de la saĝa majstro, la kuniĝon de Apolono kun Cirena akompanis la elkora favoro de ĉiuj olimpaj dioj, kiuj solenis la nupton kiu post nelonge sekvis.

Apolono kondukis sian amatinon trans la maro al la nordaj marbordoj de Afriko, kie Afrodita (Αφροδίτη) mem, la diino de la amo, bonakceptis la geamantojn ĉe la splenda nimfo Libia (Λιβύη), la dominanto de la tuta tiu regiono. La geamantoj estis gastigitaj en la ora palaco de la afabla, nobla nimfo, kiu, post nelonge, donacis al Cirena mirindan regionon de sia teritorio, al kiu estis donita la nomo Cireno kaj sur kiu estis fondita unue bela urbo kaj poste, iom-post-iome estis kreita la subluma, plej prospera kaj glora lando Cirenio (Κυρήνη / Κυρηναϊκή).

Tie naskiĝis la filo de Cirena kaj Apolono, al kiu, laŭ dia konsilo, estis donita la nomo Aristeo, kiu en la helena lingvo signifas "perfekta"!

Tuj kiam la bebo naskiĝis, ĝi estis prenita de la dio Hermeso (Ερμής), kiu irigis ĝin al Tesalio kaj ĝin liveris al la granda diino kaj dipatrino Gaja (Γαία) kaj al la Horoj (Ωραι), la tri diinoj de la prospero, kiuj prenis sur sin la taskon eduki la infanon.

Same kiel lia patrino, Aristeo grandiĝis en la libera naturo. Tie, kiam la favorita junulo atingis la adoleskecon, la Muzoj (Μούσαι) mem prenis la taskon plueduki lin. Helpe de la nimfoj ili instruis al li ne nur la artojn sed multon ankoraŭ, precipe pri la prilaborado de la tero, la kultivado, la produktado de la ĉefaj homaj bezonaĵoj.

Nu, tiele Aristeo grandiĝis bone, li iĝis bela, forta, precipe je multo, se ne je ĉio, kapabla viro. Li estis bonkora, homama, donema, afabla, tiel, iom-post-iome li akiris la famon de la malavara bonfaranto, famon kiu estis vaste diskonigita. Tial, multaj homoj, ankaŭ civitestroj, tre ofte aliris al li kaj petis pri lia helpo aŭ konsilo.

La Muzoj, kiuj amis lin multe, estis ĉiam apud li, ili ĉiam estis pretaj lin protekti kaj helpi, kaj ili apudestis, multe pli poste, ankaŭ en lia edziĝo kun Antiopa (Αντιόπη), la filino de la reĝo de Tebo (Θήβα), Kadmo (Κάδμος),

lam, ia stranga epidemio trafis Cikladojn (Κυκλάδες), la belajn insulojn kiuj ĉirkaŭas Deloson (Δήλος), la insulon, sur kiu naskiĝis Apolono. Mi skribis "stanga epidemio", ĉar estis io unueaperinta, la aero estis peza, ne facile spirebla, la homoj havis daŭran malagrablan senton de sufokiĝo, kaj laciĝo, ili perdis siajn fortojn, sian viklecon, ili ne povis moviĝi libere.

La insulanoj petis la helpon de Aristeo, kiu, sciante ke li ne estas ĉiopova, ke tia problemo superas liajn sciojn kaj povon, klopodis ekspliki tion al la petantoj, tamen volonte iris kun ili al la plej proksima al Ftio (Φθία) Ciklado, al Ceo (Κέα), kie li estis akceptita de la loĝantaro kun entuziasmo. Tie, propraokule li konstatis la krizecon de la situacio, kaj ĉar li povis fari nenion alian, kaj ĉar li bone sciis la amon per kiu favoris lin la pli multaj dioj, li supreniris, kiel pilgrimanto, kun la piedoj nudaj sur la montosupro, kie estis altaro dediĉita al la patro de la mondo, Zeŭso (Ζεὺς) kaj tie, respektoplene, per larmoj petegis pri la helpo de la granda dio, sanktoferinte al li sed ankaŭ al Siriuo (Σείριος), la legenda hundo de Oriono (Ὠρίων), kiu, lokita de la dioj sur la ĉielo, estas la plej brila stelo el ĉiuj aliaj. Li faris tion, ĉar multaj homoj kredis, ke la elspiro de la ĉiela Siriuo kaŭzas sekecon.

Zeŭso, akceptante la preĝojn, petojn kaj oferojn de sia favorato, lasis mildajn freŝajn ventojn blovi el la nordo super la Egea Maro (Αγαίον Πέλαγος) dum kvardek tagoj, kaj tiel forpuŝi la mucidan aeron kaj purigi kaj refreŝigi la atmosferon de la insularo.

Ekde tiam, ĝis nun, ĉiusomere, kiam la vetero iĝas tre varma, tiuj samaj ventoj, nomataj "meltemia" (μελέμια), blovas super tiuj belegaj helenaj insuloj, plibeligas kaj igas ilin ankoraŭ pli allogaj al iliaj sennombraj vizitantoj. Tamen, la nuntempaj insulanoj probable ne scias, ke tiun bonfaron ili ŝuldas al Aristeo, kiu iĝis tre amata, admirata, eĉ adorata ne nur pri tio kaj ne nur de la insulanoj, sed de ĉiuj homoj en la tuta Helenujo.

Tio okazis, ĉar Aristeo estas tiu, kiu la unua elpensis kaj praktikis la abel-bredadon, tiu kiu montris al la homoj la teknikon produkti mielon kaj vakson. Tamen, li faris ne nur tion, Aristeo elpensis kaj montris la metodon koaguli la lakton al kazuo kaj produkti fromaĝon. Krome, li estas la unua, kiu elpensis la greftadon de la plantoj kaj tiele li povis el la sovaĝa olivarbo estigi la kultivatan arbon, kies fruktojn, la benitajn de la dioj, olivojn, li liveris al la homoj, al kiuj montris ankaŭ la manieron ricevi post premado la valoran manĝ- kaj lumigoleon. Aristeo instruis ankaŭ la arton de la lan-prilaborado, li montris la plej efikan procedaron por ke oni, kiel eble plej bone kaj rezultodone, kulturi la teron, bredi la brutojn, fari ĉion ajn!



Ĉion tion ĉi Aristeo montris al la homoj en la tuta Helenujo, tra kiu tiacele vagadis longe. Li estis bonfarema, homama, eksterordinare bona homo.

Laŭ kio mi scias, estas multaj popoloj, kiuj havas

proverbojn, laŭ kiuj la bonuloj estas tiuj, kiuj dum sia vivo spertas la plej grandajn malbonojn. Aristeo ne povis eviti tiun sorton, estis ja destinite al li sperti du, vere dolorigajn, malfeliĉojn.

La unua estis, kiam, en sia frua juneco, li arde enamiĝis al la bela driado (δρυάς) Eŭridica (Ευριδική). Lia ekamo estis tia, ke, ekvidinte ŝin li tuj perdis sian cerbon, kiel la Helenoj kutimas diri.

La prudenta viro preskaŭ frenezigiĝis, li ne povis sin deteni, li amordeziris la belulinon kaj ĉiamaniere li klopodis ŝin akiri. Tamen, Euridica estis edzino de Orfeo (Ὀρφεύς), de la fama plej bona muzikisto de la mondo, tre amata al la dioj, eĉ filo de la muzo Kaliopa (Καλλιόπη). Aristeo, ne sciante aŭ eble ne konsciante tion, blindigita de senbrida pasio, tede amindumis la belan nimfon, kiu klopodis ĉiamaniere lin eviti. Tamen, iun tagon, kiam Aristeo renkontis Eŭridican en arbaro, senpripense, kun menso agitata de premaj sentoj, provis ŝin kapti. La virino, timiĝinte, kuris foren, ŝi ne atentis, ŝi piedtuŝis vepron, el kiu venena serpento elĵetiĝis kaj ekmordis ŝian piedon. La malbonsorta virino post momentoj mortis kaj pro tio kulpis Aristeo, kiu nur tiam rekonsciiĝis kaj komprenis kion li estis kaŭzinta. La dioj, indigninte, punis, eble pli severe ol ili devis, la frivolecon de la junulo, ili, do, tute detruis liajn abeluojn, ili malaperigis la abelojn kaj la mielon; la plej kara kreitaĵo de Aristeo estis perdita.

La kulpulo ne povis elteni tian malfeliĉon. Rekonsciiĝinte li estis bone kompreninta ke li iĝis kaŭzo de granda malbono, tamen la puno estis tre doloriga kaj li estis tiom malespera, ke li sopiris la brakumon de sia patrino. Li iris al Cireno, kie lia patrino klopodis ameme lin konsoli. Ĉar ankaŭ tio ne sufiĉis, Cirena sendis sian filon al sia amata maljunulo, al Proteo (Πρωτεύς), la loka, saĝa mara dio, kiu ĉiam protektis ŝin. La dio indikis al Aristeo la ritojn, sanktoferojn, ceremoniojn kaj taŭgajn agojn kiuj



montrus klare lian honton kaj sinceran penton kaj mildigus la koleron de la dioj. Aristeo, terure ŝokita, humile, ekscese pie plenumis ĉion kaj, same mirakle kiel ili malaperis, la abeloj, miloj, milionoj da abeloj zumis denove ĉirkaŭ li, la ben-plena mielo komencis denove flui!

Tio okazis kiam Aristeo estis tre juna, tamen la dua granda malfeliĉo trafis lin post multaj jaroj, kiam lia filo, Akteono (Ακταίων), kiun li akiris post lia edziĝo kun Antiopa, estis jam juna viro.

Tiu Akteono, fidela al la familia tradicio, amis multe la kamparon. La libera naturo, la valoj, la montoj, la arbaroj, estis lia vivejo. Li ĝuadis la mirindaĵojn de la sovaĝa naturo, vagante senĉese en la ravinoj, la kanjonoj, la krutaj mont-deklivoj, la densaj arbaroj. Akteono estis ĉasisto, eble la plej bona mortema ĉasisto, tiom bona, ke Artemisa (Αρτεμις), la brila diino de la ĉaso, kelk-foje ĉasis kunu kun li.

Tamen, same kiel lian patron, ankaŭ lin trafis la fatala sago de Eroso (Ερως), direktinte lian amdeziron al erara celitaĵo. Akteono ekamis Artemisan!

Sed, Artemisa estis ne nur diino, sed la sola virga diino, la tute pruda dia forto, kiu montradis al la virinoj la vojon al la ĉasteco. Kaj la naiva Akteono ne nur ekamis la diinon, sed li amordeziris ŝin, tiom, ke li aŭdacis fari la nekredblaĵon, li kaŝis sin apud fonto, tie, kie la diino kutimis sin bani. Li deziris kaj sukcesis vidi la diinon nuda, tamen tio kondukis al lia terura puno. Ĉar, la ĉasta diino, kies nudecon povis admiri nek dio, nek homo, kompreneble ekvidis kaj, indigninte, tuj aliformigis Akteonon en cervon!

Surprizite, ne konsciante kio okazis al li, Akteono eksaltis foren, tamen liaj hundoj, en la konfuzo de la momento, ektimiĝinte atakis la ekaperintan nekonatan beston kaj disŝiris ĝin per siaj dentoj!

Tia estis la fino de Akteono kaj tiu estis la dua granda malfeliĉo de la bonkora Aristeo.

Li suferis multe, tamen li daŭrigis sian bonfaran agadon, li komencis travojaĝi la tutan helenan landon kaj instrui al la homoj la artojn de kultivado, best- kaj abel-bredado, paŝtado, lan-prilaborado, ĉion utilan kaj necesan. La homoj, en la tuta lando, ne nur amegis lin, sed ili lin adoris kiel dion. Ili ja diigis lin, ili konstruis je lia nomo altarojn kaj sanktejojn, ili aranĝis ceremoniojn,

ili sanktoferis al li!

Iam, Aristeo forlasis Helenujon, li iris foren, al Sardinio (Σαρδηνία). Irante tien, li unue vizitis por la lasta fojo sian, maljunan jam, patrinon, al kiu li donacis silfion (σίλφιον / silphium). Kaj tiu planto, silfio, estis la plej valora donaco, kiun oni povus ricevi, ĉar el ĝi oni estigis medikamenton, kuracilon efikan kontraŭ ĉiuj kaj ĉiaj malsanoj, tiun kuracilon, kiu ricevis la nomon, nun internacian, panaceo (πανάκεια). Kaj silfio estis valorega ne nur kiel drasta kuracilo, tiu planto estis tre efike uzata de la virinoj kiel antikoncipilo, kaj, krome, el ĝi estis produktata unika spico, rara kondimento, altvaloraj bongustigaĵoj, el kiuj oni faris diversajn saŭcojn, eĉ dolĉaĵojn.

La planto de Aristeo iĝis fonto de nekalkulebla riĉeco por Cirenio, kaj ĉar nur tie ĝi kreskis, ĝi estis dum jarmiloj, ĝis la fino de la epoko de la Romianoj, la ĉefa eksportata en la tuta mondo, produktaĵo de la lando.

Foririnte de Cirenio, Aristeo atingis Sardinion. Tie li bonfaris al la homoj ne nur per siaj donacoj kaj instruoj, sed precipe per tio, ke, post peniga, persista klopodado, li sukcesis pacigi kaj unuigi la dum jarcentoj interbatalantaj triboj de la insulo. Ankaŭ tie la homoj diigis Aristeon, kiu, post kelka tempo, lasinte tie du siajn filojn, Ĥarmon (Χάρμος) kaj Kalikarpon, (Καλλίκαρπος), iris al Sicilio (Σικελία), kie li daŭrigis sian bonfaran agadon.

Reveninte al Helenujo, li atingis Trakion (Θράκη), kie li partoprenis la sakramentajn kaj misterajn ceremoniojn, aranĝitajn je honoro de Dionizo (Διόνυσος), la dio kaj kreinto de la vino. Li konatiĝis kun la dio mem kaj, dum jarmiloj, la homoj rakontadis, ke Aristeo ekdeziris konkuri kun Dionizo pri iliaj kreitaĵoj, pri la vino kaj la mielo.

Tiele ni revenas al la demando metita en la komenco de tiu ĉi rakontado, demando, kiu, laŭ kio mi scias, en la mondo de la homoj ne trovis ĝis nun respondon, ĉar la duono de la homoj preferas la vinon kaj la alia duono la mielon!

Precizan respondon tamen, donis la helenaj dioj, kiuj konfesis preferon por la vino, klariginte al la konkurantoj, ke al tia elekto kondukis ilin la fakto, ke ili povas manĝi nur malmulton da mielo, sed ili povas trinki abundon da vino!

Aristeo, foririnte de Trakio iris norden kaj ie, sur la montaro Balkano (Αίμος), tute mirakle li malaperis. Li ne mortis, verdire li malaperis, li ĉielen-iris kaj dum jarcentoj la homoj diradis, ke li ekaperis foje tie, foje alie, en diversaj lokoj de la mondo, en kiu la homoj, Helenoj kaj barbaroj, honoris lin kiel bonfareman dion.

Restas al ni la mielo!

Kaj estas ĉiam sur la norda afrika marbordo, en la

nordo de la nuntempa Libio, la bela lando de Cirena, Cirenio, lando kun glorega pasinteco, plena ankoraŭ nun je valoraj, bone savitaj restaĵoj de brilaj monumentoj, helenaj kaj romiaj kaj ankoraŭ pli novaj, arabaj kaj otomanaj.

GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO

verkis **Spiros Sarafian** el Grekio
(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)

Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo

-- el retejo OLE

Armand Su (1936-1990)



Esperanto en Ĉinio havas preskaŭ kontinuan historion ekde la komenco de lasta jarcento, kvankam periode torditan pro militoj kaj politikaj cirkonstancoj. Ne estas loko ĉi tie por multe komenti pri tiu komplika historio, kiu havis kaj siajn lumajn kaj mallumajn periodojn.

Koncerne la sorton de la poeto, kiun mi nun mallonge prezentas al la legantoj, tamen necesas menciigi la periodon de la t.n. Kultura Revolucio 1966-1976, kiam varba agado por Esperanto iĝis danĝera en Ĉinio pro suspekto pri reakcio kaj spionado. Tiam pluraj esperantistoj estis enkarcerigitaj pro iliaj kontaktoj kun eksterlando, paranoje konsiderataj minacaj al la socialismo. Inter ili estis la poeto Armand Su, arestita en 1968 pro liaj kontaktoj kun eksterlandaj Esperanto-revuoj. Li estis poste kondamnita al 20 jaroj de mallibereco, sed estis deklarita senkulpa kaj liberigita en 1979. Li mortis en 1990 post longa malsano, 54-jara.

Tra la historio de Esperanto en Ĉinio multaj literaturremaj esperantistoj okupis sin pri tradukado de ĉinaj verkoj, kie elstaras la noveloj de la granda verkisto Lusin. Tamen, ŝajne, malmultaj okupis sin per originala verkado, specife pri poezio. En la Esperanta Antologio, Poemoj 1887-1987, nur du poetoj aperas, Saint-Jules Zee (Xú Shēngyuè) kaj Armand Su (Sū Chéngzōng). Lastatempe aperis la tria poeto, Mao Zifu, kies poemaro Kantoj de Anteo (2006) vekis grandan atenton inter esperantistaj poezilegantoj.

Armand Su (sian pseŭdonimon li prenis el dramo de Alexandre Dumas, fils) naskiĝis en Pekino en 1936. Li ekkonis Esperanton en 1955 per lego de ĉinlingva traduko de la libro Vivo de Zamenhof de Edmond Privat kaj baldaŭ ekklernis la lingvon. Li komencis korespondadon kun la hungara poeto kaj verkisto Julio Baghy kvar jarojn poste. Tio konvinkis lin, ke li fariĝu poeto en Esperanto.

Du fiaskintaj amaferoj affliktis la junan poeton en tiu tempo, kiuj rivelis al li la du kontraŭajn aspektojn de

amo kiel temojn:

*per la nevenkebla magi-forto,
al vi, mia kara, mi promesas:
Mi eterne amos vin ĝis morto.*

Kaj

*Mi ŝin rigardis mute kaj ĉagrene,
en larmobril' pro ŝia am-konsolo.
Jam ŝi forglitis, ho ve, senrevene.*

Post malsukcesoj ĉe universitataj ekzamenoj Armand nun sin firme turnis al verkado en Esperanto, kaj originale kaj traduke. Liaj poemoj kaj tradukoj komencis aperi en diversaj Esperanto-revuoj en la mondo, li jam estis survoje al famiĝo kiel Esperanto-verkisto kaj en Ĉinio kaj eksterlande. Liaj temoj ŝanĝiĝis, li verkis pri la belaj pejzaĝoj de sia patrujo kaj la ĝiaj antikvaj legendoj, inter ili eposojn, ekzemple laŭ la legendo pri La Tria Fratino Liu:

*En Ĝungian, vilaĝ' riverborda,
loĝis harmonie paro olda.
Ili teron plugis diligente,
vivis tre feliĉe kaj kontente.
Ili havis filon kaj filinon.
Jen naskita la tria – knabino ...*

kaj tiel plu tra 158 versoj.

La kolektita poemaro de Armand Su aperis en 1992 ĉe Ĉina Esperanto-Eldonejo en Pekino. Ĝi enhavas 178 poemojn. Forme lia poezio ne estas sub modernismaj influoj, liaj poemoj estas laŭmetrikaj kaj rimitaj. La poemoj estas aranĝitaj kronologie, kio prezentas kortuŝe lian vivon, ties drastajn kontrastojn, unuflanke liberon, amon, kontaktojn, aliflanke opreson, malliberon, izolon. La poemo, Kuŝante sur la ĉerko, verkita en 1967, la jaro antaŭ lia aresto kiel minaco al la socialismo pro sia internaciema esperantismo, esprimas lian tiaman staton kaj cirkonstancon, kiam la poeto vivis vagabonde, provante eviti la fatalon, kiu fine lin frapis:

*Oni pelas min de dom' al dom',
nun fariĝis mi senhejma besto.
Sen manĝaĵo kaj sen varma nesto,*

vagabondas mi kvazaŭ fantom'.
Mi tranoktas sur malplena ĉerk',
super la kapo – la ĉiel' milstela.
Mi meditas en ĉi nokt' malhela
pri l' kanto cigna – mia lasta verk'.

Antaŭe li estis verkinta pri sia ĉagreno pro la forrabo de lia skribmaŝino fare de la ruĝaj gvardianoj:

Larmis mi dum nokta hor' amara.
Kiom longe tio min ĉagrenis.

Tragika sorto, tragika tempo. Oni nur povas ĝoji, ke Esperanto nun denove bone vivas en Ĉinio, la patrujo de Armand Su, kiun li tiom amis.

de **Baldur Ragnarsson**

Juna amiko, septembro 2011

Fonto: <http://literaturo.esperanto.net/tekstoj/ragnarsson/su.html>

el la literaturaj paĝoj de Monda Asembleo Socia (MAS)

tradukis Vilhelmo Lutermano el Kubo

Boto Ŝtraŭso 1: Pri amo

Historioj kaj maloj

Fabeloj pri viro kaj virino

La virino sur la pramo (parto 3)

(daŭrigata)

Kompreneble estis la duonsvena, deprenita kaj dependa parto de mia konscio, kiu tiel aŭ simile glorigis mian situacion. Sed apude ekzistis ja ankoraŭ la eta, malalta ŝtumpo de maldorma menso. Ĝi serĉis intertempe urĝan ŝanĝon kaj movon.

Plurajn fojojn mi perceptis nun el la foro la simplan kaj doloran kanton, kiu jam foje vekis min el la dormo, kiam mi, elĉerpita de la 'nepereonta horo', ripozis en la abrikotkolora ĉambro.

Estis forta, alta knabina voĉo, kiu leviĝis plej ofte en la frua vespero malantaŭ la ĝardenmuro, kaj la vortoj ĝisvenis duone kantataj, duone vokataj. La aliaj en sia obtuza rondo ŝajnis ne aŭ ne plu rimarki ĝin. Sed mi sentis ĉiufoje pli grandan efikon de tiuj sonoj sur min. Kvankam mi ne komprenis la vortojn, ŝajnis al mi, ke klara petado portas la voĉon, kaj estis ankaŭ, kvazaŭ ŝi elektintus la kantadon nur post vana kriado de mil vortoj. Ne, ŝia kanzono ne estis senutila arto, ĝi estis la pura peto.

Ĉiufoje, kiam mi aŭdis ĝin, kaptis min stranga maltrankvilo; estis kiel diskreta susurado en la suproj de la klara menso. Tio tiam eltiris min nerezisteble eksteren en la ĝardenon, kaj mi eĉ sukcesis levi min el mia krepusko, de la tablo kaj el la malforta lumcirklo, kaj, kvankam tamen fiksito, refari tiun vojon, kiun mi foje faris kun lasta forto. Certe, ĉe tio mi neniam atingis pli ol tiun lokon, kie mi frapiĝis kontraŭ la sfero de Mero, do mi ankaŭ ne povis atingi la blankan ĝardenmuron aŭ eĉ superi ĝin.

Mi devis krome konstati, ke, apenaŭ mi elpaŝis el la postĉambraĉo, la kantado abrupte ĉesis kaj kun kraŝanta sono tute mutiĝis.

Sed iun tagon mi entreprenis fortostreĉon de plej alta penado; io, kio preskaŭ jam limis ĉe ruzo kaj atingo de la libera volo. Mi nome sukcesis, jam antaŭ la horo, en kiu la kantado kutime komencis, treni min en la malgrandan ĝardenon, kiu sub la griza varmego-nebulo efikis ĉiam same prema kaj dezerta. Facila kaj memkomprenebla konscio povas apenaŭ imagi, kiom da nedirebla peno kaŭzis al mi, kun mia malvigleco, en la katenoj de la devoteco fari vere propran decidon, eĉ sen la stimulo de la kantado, tiu sensvekilo, sed tute el interna instigo kaj en plumba antaŭvido. Sed poste, paŝante malantaŭ la domon, trenante miajn piedojn sur la malpura gravelvojo, direkte al la muro, jen okazis, ke ĉiu mia pezeco kaj obtuzo subite malfermiĝis en solena kaj sensona eksplodo, tiel ke la mortokruĉo de mia ekzisto dissaltis en mil pecojn kaj alfluis senlima rigardado. Tio okazis, kiam ni troviĝis unu en la okuloj de la alia, la juna knabino, kiu tie kliniĝis super la muro, kaj mi, kiu fine atingis ŝin. Kaj mi atingis neniun alian ol la pli junan Meron mem, knabino de apenaŭ nur dek ses jaroj, juna kreaĵo kun volupta fendo inter la antaŭaj dentoj, kiu apogis sin kun la nudaj antaŭbrakoj sur la mursupraĵo, la senzorga etulino, kiu de sia pli aĝa memo ne estis allasita trans la muron, eĉ entute ne estis allasita de ŝi; tiu nematura kaj valorega estaĵo, kiun la sperta virino ĉiam time forpelis, ĉar ŝi ĉiam konsideris ĝin embuskulino, ŝtelistino, eĉ danĝera rivalino.

Sed kiam mi staris fronte al tiu knabino, jen la tempo-spaco dividiĝis kaj la rekta rigardo, kaj ni ĉirkaŭis nin. Kvazaŭ transblovite, mi troviĝis subite ekster la muro, tuj apud ŝia renversita biciklo, la elŝutita lernejeteko, la malfermita legolibro, ĉe kies mieldolĉaj marĝenoj gluis la vespoj. De ĉi tie mi ekvidis nun la



abundan, super la muron klinitan korpon, la sidvangojn ŝvelantajn sur la eĝo, la duone nudan dorson sub la alten glitinta pulovero, la delikatan denask-makulon supre de la blua hirtteksta kalsoneto. Sed preskaŭ samtempe mi estis ankaŭ en la ĝardeno alpaŝante ŝin; mi superis la nevideblan baron, mi povis fari novajn unuajn paŝojn, sed jen mi sidis denove ekstere sur la trotuarrando, kaj antaŭ mi pendis ŝiaj disigitaj gamboj, apogis sin la nudaj, internen turnitaj piedoj kontraŭ la malglata murŝtono, gratis la piedfingroj ĉe la mortero. Sed nur supraĵa vido estis al mi permesita, kaj jen mi ree staris en la ĝardeno antaŭ ŝia hela, ronda vizaĝo. Nun jam tiom proksime, ke mi povus tuŝi per etendita mano ŝian molan, infanecan hararon - se ne sammomente plenigus min la deziro havi ŝian dorson komplete nudigita antaŭ mi, tiel ke mi, translokite eksteren, senhezite eksaltis de la trotuarrando, malligis al ŝi la zonon de la ĵinsoj kaj deŝovis la vestaĵon ĝis la maleoloj. Sed sen ĝui ĉe tio ŝian konfuzitan rigardon, mi ne estis kapabla delekti min je tiu nuda dorso. Tiel mi do alpaŝis ŝin en la ĝardeno kaj tute levis min al ŝi. Kompreneble mi havis ĉe tio nenion alian en la menso kaj estis intertempe transe de la muro okupita de nenio alia ol per malmola lango, per la fera hoko de putobuŝo malfermi al ŝi la graciajn femurojn. Sed mi vidis, kiel gaja sensspurado travagis ŝian vizaĝon kaj kiel ŝia kokso ĝoje kaj puŝe moviĝis. Jen ankaŭ ŝi nun saltis de sia ĝisnuna pozicio, deiris kun nesekvebla lerteco de la mureĝo, por tuj servoprete ekkaŭri antaŭ mi, kapti mian elstarantan radikon kun eta mano kaj plenigi per ĝi la ŝaŭmantan O de siaj lipoj. Sed apenaŭ farinte tion, ŝi rimarkis, kiom urĝe ŝi bezonis la tuŝon de ŝia disigita profundo - kaj kiom mi malhavis la enfosigon de mia vizaĝo en ŝiajn molajn femurovangojn. Tiel do estis tuj ree inverse, kaj ŝi kliniĝis antaŭ mi, apogite sur la kubutoj, super la mursupraĵon, prezentis al mia sian feliĉan, senprotektan dorson. Ni lasis nin al la unika dispozicio, en kiu mi kiel la nevidanto entuziasmigis la supre elrigardantan, en kiu mia enfosigita vizaĝo heligis ŝian okulon. Sed ĉar samtempe ŝia malplena, demanda buŝo kaj mia rigida, unika respondo malhavis unu la alian, ŝi ankoraŭ en la sama spiro de delico rekaŭris antaŭ miaj genuoj kaj ĉirkaŭigis mian unusilaban respondon per la plej teneraj kromdemandoj. Tiel ni alflugis nin en vera vent-, ja eĉ en amrapido, kaj inter prezentado kaj aktiva servo, inter allasado kaj sturmado niaj ĝuoj ŝanĝiĝis de unu palpebrumo al la venonta. El tiu neimageble rapidaj turniĝoj estiĝis danco de unuiĝo, kian pli belega du homoj eble neniam spertis.

Sed kiam mi estis levota de tute neimagitaj vivofortoj, jen subite fermiĝis la korpo super la muro, ĉio abrupte haltis kaj fiaskis. Mi aŭdis laŭte voki mian

nomon. Estis la pli aĝa Mero, kiu el de la ĝardeno vokis. Aĥ, la araneo kaj ŝia teda umejo! Ĉu mi do ankoraŭ ne eskapis al ŝi? Duan fojon ŝi vokis mian nomon, kaj sur la arko de sia sono ŝi transprenis min, tiris min akre tra la aero. Mi ĵus ankoraŭ vidis, kiel mia rapida amatino plumpe kaj senmove sinkis de la muro. Mi alteriĝis dorse sur la ĝardena gravelo, ĉirkaŭirata de kraĉospiranta, siblanta mastrino. Sed, interrompita sur la plej dolora alteco de mia ekscito, mi petegis ŝin montri sin kompatema kaj plenumi senprokraste la reston da bonaĵo, kiun ŝi ĵus kiel juna knabino retenis. Sed ŝi ne komprenis, kion precize mi celis, sed vidis nur, ke mi bezonis ŝian tuŝadon pli urĝe ol la soifomortonto la akvon. Daŭre ĉagrenita kaj incitita, ŝi tamen levis sian rubenruĝan vesperrobon kaj malbonhumore kaŭris sin super min. Tiel mi urĝe reetendis min en tiun saman kaj tamen verŝajne ne plu saman ventron. Sed mia seniluziigo kaj ŝia indiferento nun serioze endanĝerigis la finan plenumon de mia trudprema respondo. Esperante iom instigi nin ambaŭ, sed precipe min, mi komencis rakonti pri la ĝuplenaj agadoj, de kiuj mi estis ĵus forŝirita, kaj mi konfesis al ŝi, ke estis ŝi mem, kun kiu mi trompis ŝin, kaj ke ni amuziĝis senhonte kiel aerspiritaj, ĉar estas ja neniu alia ol ŝi mem, kiu ekstere kantas antaŭ la muro, kiu tiel sopire vivas trans la muron, ŝia propra juneco, jes ja, kiu ekstere pereos pro sopiro kaj volas fine vivi kun ŝi!

Sed kiom dolorigaj estis la sekvoj de miaj vortoj, per kiuj mi tamen nur esperis movi ŝian grumbleman kaŭradon! Sed anstataŭe ŝi super mi profunde enpeniĝis kaj miaj plej violentaj baŭmadoj ne kapablis movi ŝin el ŝia stato. Subite ŝi leviĝis, senkonsidere absorbita de pensoj, kaj lasis min sola sur la plej supra, plej turmenta elstaraĵo, de kie ne eblas plu reiro nek transo. Mi certe restintus por ĉiam sur tiu supro de voluptodoloro, rigidiĝinta al priapa kolumno, se ne en tiu momento okazintus neatendita ŝanĝiĝo, kiu mirakle mildigis min, kiu savis kaj purigis min de la plej krudaj kaj plej stultaj eroj de mia avido.

La virino de la pramo nome paŝis al sia kutima loko, de kie ŝi preskaŭ ĉiutage gardis la muron, kaj nun ŝi vokis kun plej frua, timetema voĉo la propran nomon, kvazaŭ ĝi neniam tuŝintus ŝiajn lipojn.

Malsame ol mi la juna knabino tuj poste ne estis venigita surdorse de la sono, kolere surblovita, kaj ne devis, ĉiujn kvar membrojn disigite, kiel renversita skarabo, alteriĝi sur la malmola gravelvojo. La pli juna Mero male aperis nur tre malrapide; ŝiaj manoj unue ŝoviĝis sur la mureĝo, frunto kaj okuloj leviĝis singarde super la randon, kaj ne tre lerte ŝi levis sin sur la muron. Ŝajnis apenaŭ imagineble, ke tiu pufa kreaĵo partumis kun mi tian frenezan rapideckstazon, kiu transformis niajn amuziĝojn en fean furiozrapidadon.

Sana pezeco estis reveninta en ŝiajn membrojn - tute konvena por la pigraj formoj de ŝia antaŭvirina korpo. Nun la pli aĝa Mero alpaŝis hezite sian knabinan figuron; kaj ankoraŭ ne estis direble, kian akcepton ŝi faros al ŝi. Sed kiam ŝi venis proskime al la muro, jen ŝi etendis al la pli juna subite ambaŭ manojn, por apogi ŝian deiron de la muro kaj por preni ŝin en la ĝardenon, kiu tiom longe estis al ŝi malpermesita. Iomete poste mi vidis ambaŭ virinojn fine stari unu antaŭ la alia, la matura ridetis afable pri la frua, sed tiu admiris la alian senkomprene. Ili bezonis certe bonan tempon por ekvilibrigi siajn reciprokajn malkovrojn. Sed post tio ili brakumis sin kaj tenis sin strete ĉirkaŭvolvitaj, kvazaŭ neniam antaŭe ekzistus pli firma paro.

La sincera repaciĝo inter tiuj samaj kaj tamen laŭ la mezuro de la sperto kiel de la atendo tiom strikte distingendaj animoj, kiu envere okazis nur pere de mia nefleksebla volupto, tiu do absolute paca sceno plenigis min ne nur de kortuŝeco kaj nobligis mian restantan deziregon, sed ĝi redonis al mia memoro ankaŭ sammomente ĝian liberan spiron. Mi sentis, kiel mi milde, sed kontinue, estis liberigata de la memor-kaptiteco de Mero. Ĉar subite, kvazaŭ post longa, vintra frostoj, moviĝis ree la pli fajnaj sensoj, etendiĝis kaj malfermiĝis la plej foraj spuroj, kaj mi retrovis min en vivo preskaŭ pli abunda ol mi vere estis vivinta; en kiu ekzistis certe multaj maltrafoj, sed ankaŭ abundo da plenumitaj historioj, sennombraj renkontiĝoj kaj konsentoj, jesadoj, pri kiuj mi antaŭe ne ĉiam konsciis. Sed nun ili aperis en la abundo de mia konsciiĝo, kaj mi troviĝis en senzorga societo kun ĉiuj ĉi netrovitaj, longe forgesitaj figuroj, tiuj kun bona reputacio¹³, kiuj iam krucis mian vojon. Resanigita konsciiĝo, jen, atinganta malproksimen kaj profunden kiel neniam anataŭe, tion mi dankis la bonan vidon al la rara paro, tia paro, ke renkonteblas apenaŭ iu pli unuiĝinta inter homoj, ĉar nek viro kaj virino nek gepatroj kaj infanoj povus iam ajn pli dolore disiĝi, pli intime retroviĝi, ol faris la pli juna kaj la pli aĝa Mero.

Unu post la alia nun eltrojis la ceteraj fiksitaj, la silentaj viroj de la tablorondo, el la postĉambro. Ili rigardis malvigle en ĉiujn angulojn kaj stulte en la alton kaj frote glatigis al si la kostumojn, kiel homoj dormintaj tro longe dum la tago. Sed, tiuj magraj buboj, ĵus elrampintaj el la Mera karcero, nur apenaŭ evitinte la danĝeron disbloviĝi en unu el ŝiaj memorbreĉoj, ili vigliĝis videble en sia tuta mediokreco¹⁴. Apenaŭ ili nur iomete rekonsciiĝis, jen ili jam estis inter si, kiel najbaroj en kampadejo, bruis kaj sternaĉis sin en la difektitajn ĝardenmeblojn kaj konkurencis en fanfaronadoj. La maldikulo, la grizulo, la junulo, la barbulo kaj la helulo, la ekstazitaj malliberuloj, nun ili ree babilaĉis, kaj la alta animstato, en kiu ili iam estis

kaptitaj kaj en kiu ili tiom longe restis, nun rapide disbloviĝis en la disputo: kiu travivis la plej premiindan kaj plej malkaran¹⁵.

Nur nun mi rimarkis, ke ankaŭ mi estis tute libera kaj troviĝis ekster ĉies observado. Lastfoje mi rigardis, preskaŭ tenere, transen al la multinflua virino de la pramo, kiu, flanke de sia juneco, intense promenis en la ĝardeno, jam sen eĉ iomete atenti nin aliajn. La du havis evidente multon por intertrakti. Kaj ĉu ili fine vere repaciĝis kaj restis kune, tio ege dependis ankaŭ de tio, kiomgrade ambaŭ saĝaj, sed kontraŭaj gardistinoj de homvivo: atendo kaj sperto, povis interkompreniĝi.

Mi tamen preferis aliĝi al neniu kaj serĉis rapidan kaj nerimarkeblan malaperon el la domo de Mero. Tio nun jam ne estis plu decido malvigla, malfacila kaj peniga. Nun ĉio sukcesis jam preskaŭ tro glate. Iomete poste, per taksio returninte en mia hotelo kaj fininte ĉiujn preparojn por mia vojaĝo, mi restis ankoraŭ kelkajn minutojn antaŭ la larĝa fenestro de mia neuzita ĉambro kaj rigardis tra la griza Bosporo ĝis la tombejo de skdar. Daŭre kuŝis la densa nebulo de varmego super la urbo. Sed mi sentis min plej bone resumita kaj tiel restarigita kvazaŭ mi profunde kaj ĝissate ripozintus.

Mi, kiu ja tre bone scias, ke tiu ŝtofo 'realo' en sia kruda ekzisto estas nenio alia ol nura renversiĝo, senfunda alĥemio, mi nun trovis subite sanan plezuron distingi la aĵojn laŭ iliaj firmaj siluetoj kaj iliaj konstantaj kontrastoj. Tiel ne estis mirinde, ke la profunda funebro pri mia mortinta amiko preskaŭ komplete foriĝis de mi, kiel spirajo sur malvarma glaso. Ĉar nun mi forlasis la urbon ĉe la Ora Korno en la bonfartiga certeco vojaĝi kun lia fidela kaj bonhumora akompano, preta lasi min infekti de la sereneco de tiu, kiu konas la tutan veron.

(FINO)

¹ *Botho STRAUSS (naskiĝis la 2-an de decembro, 1944 en Naumburg) estas germana aŭtoro de rakontoj, romanoj, dramoj, eseoj kaj filmscenaroj.*

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

<http://vlutermano.free.fr/pramo.html>

"Aŭskultu, bon-amik'! Ne estu ni azenoj,
 Dum leciona paŭz' proponon havas mi:
 Por la kaŝtan-rikolt' mi iru al ĝardeno."
 "Ne, Fedja, tiu manĝ' ne estas nun al ni,
 Tro alta estas arbo.
 Ne povas ni alrampi ĝis la frukt'
 Kaj tute fremdas nin alloga manĝ-produkt'!"
 "Ne timu, kamarad'! Plej helpos nin konjekto!
 Ja kie mankas fort', necesas intelekto.
 Elpensis ĉion mi laŭ saĝa bon-aranĝ':
 Vi helpu min alrampi nur al branĉ',
 Atingos mi la fruktojn lerte,
 Kaŝtanojn manĝos ni ĝisstate, certe."
 Jen ili al ĝarden' ekkuris kun rapid',
 Kaj Senja al amik', al Fedja helpis multe,
 Por grimpu kamarad' al arbo bon-rezulte,
 Ne vana estis help' kun granda pen' kaj ŝvit'.
 Al supro venis jam la knabo en sukceso.
 Kaŝtanoj en abund'. Mirindas la impresoj!
 Verdire estis ĝi riĉaĵo, kaj senfin!
 Ĉu eblas nun kalkuli ĝin!
 La knabo havas multon por profito,
 Eĉ por donac' amika laŭ merito, —
 Kaj Senja sur la ter' rigardas kun manĝem',



Sed estas de rigard' mizera nur efiko,
 Ĉar Fedja manĝas fruktojn mem
 Kaj ĵetas de la arb' nur ŝelojn al amiko.
 Lertulojn vidis mi en viv'
 Por kiuj bon-amikoj kun naiv'
 Al supro rampi helpis kun fervoro,
 Sed poste ŝelo eĉ ne falis de sinjoro.

verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
 tradukis Sergej Grigorjeviĉ Rublov (1901-1979)
 Ukrainio


Meĥanikisto Robert

tradukis kaj sendis Roland Platteau el Francio

Somere la bona maljuna
 meĥanikisto Robert'
 Kune kun lia hundo
 Paŝas laŭ la bordo ĉiun aŭroron
 Kaj kontemplas la tagiĝon
 Tra la mara brumo
 Li laboras ofte la tutan matenon
 En sia aŭtejo
 Dum lia katino
 Dormetas kun la hundo
 Antaŭ la ŝarĝaŭto

Posttagmeze
 Li dormas siavice pace
 En sia apogseĝo
 Sciante ke li prizorgos la florojn
 Antaŭ vespermanĝo
 Liaj filoj kaj liaj amikoj
 Venas poste viziti lin
 Kiam la vizitantoj
 Petas de li rakonton
 Neniam li rifuzas
 Ĉar li ŝatas
 Rememori
 Rakonti
 Komenti

Sed noktokomence
 Li sidas
 Sola kun liaj bestoj
 Kaj sub la siringo
 Li priploras
 Silente
 Pri sia luma
 Mortinta
 Edzino
 Kara
 Kara
 Lea



Sébastien Garant

*Tio ne estas mi, kiu ne plu kapablas pensi, nek senti,
 kiu ne havas la forton matenan leviĝi aŭrore kaj paŝi
 laŭ marbordo antaŭ ol iri al laboro! Kaj mi neniam
 kapablis nek kapablos labori en aŭtejo, kaj mi ne
 siestas posttagmeze, alie mi ne plu povus releviĝi kaj
 estus tiom malbone post dormo, ke estus forta eraro
 tion fari. Kaj ĉefe mi ne havas amikojn kiuj vizitas min,
 kaj nek filojn. Kaj neniam ajn iu ajn petas de mi
 rakonton, tiel ke, la emon kaj kapablon paroli kaj
 paroli, kiun mi havis nur dum juneco kaj al mi mem, mi*

*perdas nun ... Rememori, rakonti perdiĝas, kaj
 komenti nur faras sur Interreto kaj po iometo.
 Do,
 ne estas mi...*

tradukis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio

Sébastien GARANT. 1967. Kanadano. Naskiĝis en
 Levis, Kebeko. lama pentro-artisto. Verkis ankaŭ en la
 franca.



loki ilin simple ĉe la rando?"

„Ili estu malpermesitaj! Hieraŭ tre proksime preterpasis min junulo sur skutilo. Mi vere ektimis.“

„Oni ne rajtas veturi sur trotuaroj, ĉu ne? Sed, kion fari? Estas ankaŭ malpermesite stari kun du personoj sur tiaj transportiloj. Sed tion mi ankaŭ jam vidis.“

Karl kontraŭdiris: „Jes, pli bone estus simple leviĝi en la aeron. Baldaŭ ni ĉiuj nur ŝvebos tra la ĉielo.“

Per tiu rimarko la unua fazo de la matena rondo finiĝis. Karl komencis sian prelegon. Unue temis pri 'Vimanoj' (en sanskrito: विमान, vimāna).

Vimanoj estas menciitaj en antikvaj hindaj tekstoj. Tie ili aperas kiel flugmaŝinoj de la dioj. La vorto 'Vimana' povas ankaŭ havi alian signifon, ekzemple 'trono' aŭ 'templo'.

La maŝinoj, kiuj estas priskribitaj en la antikvaj tekstoj, havas grandan similecon al la nunaj, modernaj kosmoŝipoj. Laŭdire kelkaj de ili oni povis kontroli nur per pensoj. Estas klare, ke Erich von Däniken klasifikas ĉi tiujn flugaparatojn kiel spacoŝipojn de la eksterteruloj. Certe restas la problemo, ke la antikvaj hindoj transdonis la rakontojn nur buŝe. Nur pli poste komenciĝis la skriba dokumentado. Tial, kompreneble,

Aviadiloj

La bulkoj kaj la kafo ankoraŭ ne estis servitaj, tial niaj maljunuloj kaptis la ŝancon denove komenci la konversacion per etaj plendoj.

„Ĉu vi hodiaŭ vidis la du elektrajn skutilojn, apud la bushaltejo?“

„Jes, ili tute baras la vojojn. Ĉerte iu stumblas pro tio. Kial oni ne povas

tiaj informoj ne estis ĝuste certigitaj.

En la interreto troviĝas paĝoj, kiuj eĉ raportas realan trovaĵon de tia antikva flugaparato. Laŭdire estis usonaj soldatoj en Afganio, kiuj trovis ĝin 2012 en kavo. Ekde tiam ok soldatoj tute malaperis. Sur la paĝoj oni povas admiri eĉ foton de tia 'Vimano'. Apud la aparato staras soldato. La 'Vimano' aspektas kiel kapsulo el metalo proksimume duoble pli alta ol homo. Ĝi iomete similas al la konata 'Mercury-Spacokapsulo' de la NASA.

„Strange, kial oni neniam aŭdis tion? Sed, ĉu estas veraj fotoj, kiu scias?“, notis Gerd.

„Evidentiĝas, estas du ebloj. Se tio veras, la respondeculoj tuj sekretigus la raporton. Sed mi emas pensi, ke la tuta afero estas nur elpensita sensencaĵo. Kaj neniu volas havi rilaton kun tio“, komentis Jens.

Karl daŭrigis sian prelegon rakontante pri filmo, kiun li spektis. En tio estis ekscita raporto. Antaŭ miloj da jaroj venis eksterteruloj al nia tero kaj ĉi tie ili eĉ estis implikitaj en militoj uzante altnivelan teknologion.

„Mi spektis tiun filmon ĝis la fino. Ĝi vere estis interesa. Sed finfine mi estis seniluziigita. Mi ja volis scii, kiel aspektis tiaj flugaparatoj. Sed tion la filmo ne prezentis. La anoncisto nur klarigis, ke por spekti la tutan filmon oni pagu 49 Eŭrojn.“

„Nun, ja, tiuj homoj volas gajni monon. La vero tute ne tiel gravas. Ĉu vi pagis?“, demandis Jens.

Kompreneble, Jens ne transdonis la monon. Do, por ĉiuj klariĝis, ke estas malfacile filtri la ĝustajn informojn el la fluo de sciigoj.

(daŭrigota)

verkis **Klaus Friese** el Germanio
(plumnomo Erik Tantal)

fonto: <http://esperanto-klaus.de/>

15>>

malfacilaĵoj, por gardi la honoron kaj teni la donitan parolon iliaflanke. Komence ŝi malfacile komprenis profunde la terminojn “nder” (honoro) kaj “besa” (donita parole), ilian apartan signifon ĉe albanoj. Sed ŝi klariĝis pri ili dum la konversacioj kun Fatmir kaj Liliana.

Ŝi informis simple la edzon ke instruos lernokurson de la rusa dufoje semajne postagmeze. Li demandis kie, kaj ricevinte respondon diris:

- Tre bone, Vera. Tiel vi pasigas ankaŭ la tempon. Ĉu tio envere plaĉas vin?- rimarkante ke ŝi aspektis enpensiginta.

- Ne, ne. Mi iros- respondis Vera ridetante sen plezuro.

La unua semajno de la kurso pasis bone. Entute estis ok personoj, el kiuj du inoj. La kurso okazadis mardojn kaj vendredojn, de la kvara horo ĝis la sesa posttagmeze. Ĉiam venis kaj prenis ŝin iu “Gaz” por veturigi la kursejon. La samo venis por revenigi ŝin hejmen.

Ne estis “Gaz” de la ĉefo.

(daŭrigota)

rakonto de **Bajram Karaboli**
tradukis kaj sendis **Bardhyl Selimi** el Albanio



Bayram Karaboli



monato lin translokiĝis en iun urbon en la nordo, iom plialtigante la postenon. Foriris ankaŭ Liliana, disiĝante okullarme kun Vera. Vera ĉiam suspektis ke estis ŝi la kialo de ilia translokiĝo.

Nun Vera sin sentis soleca kaj neprotektita. Konsiderante la averton de Liliana, ŝi ne plu diris al Fatmir. La entrepreno, kie li laboris kiel konstruĝeniero, estis konstruante cigaredfabrikon. La fabriko devus transdonati okaze de datreveno de proklamiĝo de sendependeco, tiel la laboro por ties konstruiĝo daŭris dek ses horoj tage. Fatmir eliris el la hejmo je la sepa matene kaj revenis je la oka vespere, eĉ pli malfrue. Li estis tiom okupita kaj lacigita, kiom ne restis tempo libera por pasigi tion kun Vera. Jen, ĵus ni finos la konstruiĝon dela fabriko kaj restos kune pli longe- diradis li.

Estis semajnokomenco kiam la lernejestro alvokis ŝin matene en sia oficejo kajridante kiel kutime diris:

- Vera, estas bona novaĵo por vi.
- Kio? - demandis ŝi mirmiene kaj plezure samtempe.
- Vi instruos ruslingvan kurson dufoje semajne, posttagmeze en iu grava institucio.

- Kie?

- En Departemento de Internaj Aferoj- respondis direktoro sincere ĝoja - Estas grupeto de oficioj dezirantaj eklerni la rusan.

Subite, al Vera foriris la rido el la vizaĝo kaj pripensinte momente, diris:

- Direktoro, pli bone iru tie Agim. Mi sentas min laca. Vi ja konas ke mi estas graveda...

- Kion vi diras Vera? Tiu honoro estas por vi. Ne nur pro la graveco de institucio, sed ankaŭ pro pago. Oni pagos vin kromhorojn. Poste, Agim ne havas vian nivelon por instrui la rusan tie. Ne, ne, ne diskutu tion. Mi decidis por vi kaj transdonis vian nomon. Mi petas, ne embarasigu min- kaj la direktoro ne plu retiriĝis, nek volis argumentadi, se Vera ne interrompus lin, dirante:

- Bone, konsentite.

Definitive, Vera komprenis ke la homo je la nomo Kapo Alushi ne disiĝus de ŝi, tial, neatendite, ŝi decidis konvinkite. Okazu kio devus okazu, ŝi alfrontiĝus mem al ĉio. Ekbatalus. La bopatrino, en diversaj konversacioj pri la vivo, estis rakontinte al ŝi interesajn ekzemplojn de albanaj virinoj por la transpaso de

>>14

Liliana, malgraŭ estis iom malfacile por klarigi tion, diris kelkajn kozojn ĝenerale. La familio de la onklo de Liliana estis persekvita pro politikaj kaŭzoj. Ŝi povus ne esti eĉ instruistino pro tio, sed la familio de la patro kaj de la edzo estis kun "bona biografio"(bona politika konduto). Tio estis la termino uzata por la homoj, kiujn la ŝtato, nunpornun, konideris siajn, t.e, lojalajn kaj sekve tenis ilin apude.

- Mi konsilas al vi ne diru ion al Fatmir. Ĉar tiel la kozo pli komplikiĝas. Dume evitu tiun homon- tiel finis la babilon Liliana.

Vera ĉiam iris kaj revenis kun Liliana.

Iutage ambaŭ ili eliris el magazeno kaj direktiĝis al la busstacio por reveni hejmen. Dume alproksimiĝis iu "Gaz" kiu haltis apud ili. La ŝoforo eligis sian kapon tra fenestro kaj ridetante alparolis ilin:

- Profesorinoj, vi povas enaŭtiliĝu. Mi kondukos kien ajn vi volas. Mi estas je via dispono.

- Multan dankon, sed ni atendas niajn amikinojn- tujrespondis Liliana.

La tonuso de Liliana estis tre klara kaj "Gaz" foriris.

- Ĉu vi vidis kiu estis? - demandis Liliana al Vera.

- Ŝajnis al mi la ŝoforo de tiu - diris iom konfuze

Vera

- Jes, li estis - diris Liliana.

Alvenis la buso. Ili enbusiĝis kaj ne plu parolis pri tiu temo kvazaŭ ĝi estis ia tabuo. Ankaŭ la babilado pri aliaj kozo estis iom pala.

La edzo de Liliana estis ordinara militisto. Post

10. Militkaptitoj

Kiam al Glano ĉesis kapturado, Pizeto jam plu ne ĝemis. Li suferis kunpreminte dentojn kaj eĉ provis rideti.

– Nun mi nenion timas, – konsolis sin Rapidulo. – Vi ja estas fama doktoro, do vi baldaŭ sanigos min.

– Kompreneble, – promesis Glano kaj, kunpreminte la kapon per manoj, profunde enpenŝiĝis.

Ĉi momente li malamamis sin pli ol ion ajn alian. La vivo de Pizeto pendis kvazaŭ sur haro, kaj li ne povis helpi sian amikon, ĉar li konis nenion plu krom mensogi kaj fanfaroni. Inter alie, Glano estis foje vidinta, kiel homoj kuracis la putriĝintan flankon de lia patro per cementmastiko, sed li ne povis imagi, kie tia magia kuracilo estis ricevebla.

Kaj Pizeto pli kaj pli malboniĝis. Glano kuris al rivereto kaj portis al li plenan bireton da akvo.

– Nur ne mortu, – petegis li sian amikon. – Estu bona kaj ne mortu.

– Mi eĉ ne pensas pri tio, – kuraĝigis sin Rapiduleto. – Vi ja tuj ekkuracos min.

En la kavono ilin trovis flegistino Fazeolino. Ŝi elteris el sia saketo iom da vakso, por unu suferinto ŝi gluis flankon, por la alia vunditan kapon kaj flegis ilin senretrete sep diurnojn ĝis kiam ambaŭ amikoj firme ekstaris sur piedoj. Sed dum tiu tempo la fronto antaŭeniĝis kaj la tuta trio okazis sur la malamika tereno.

– Kial vi ne retiriĝis kun sambatalantoj? – Glano demandis la flegistinon.

– Kiel mi povis lasi en malfeliĉo la amikojn de nia Sabalbon–Sabalbonego? – miris Fazeolino. – Vi ja estis serioze vunditaj.

– Hura! Hura! Hura! Pli bonan mi ne konas! Vi estas la plej bona! – Glano ne eltenis kaj sian raviĝon pri ŝi eldiris per verso.

– Mi ne komprenas, – kapneis Fazeolino.

– En poezia lingvo tio signifas, ke vi estas mirinda knabino. Vi savis nin de morto.

La flegistino mallevis la okulojn kaj diris nenion plu.

– Donu al mi mapon, mi deziras klarigi al mi, kie ni nun estas, – postulis Glano.

– Kaj kio estas mapo?

– Por ke vi scipovu legi ĝin, vi devas minimume kvar jarojn frekventi lernejon, – larmoj de Glano tuj sekiĝis.

– Kaj ĉu vi frekventis? – demandis Fazeolino.

– Mi estas fama... hm... – tusetis la fanfaronanto,

dezirante mensogi, tamen aŭdinte la ĝemon de Pizeto, li diris: – Por unu jaro. La mapo tre utilis por ni. “En bona mapo ĉiu arbusto estas signata”, – diradis mia instruisto Korako.

Timante ion ree mensogi, Glano stariĝis kaj ŝanceliĝante iris tra la kampo. Subtenante sin al la ŝultro de fazeolino, lin sekvis ankaŭ Pizo.

Ĉe la agrostido forhakita de obusero kuŝis vundita rajdanto. Lia ĉevalo, kun mallevita kapo, staris apude. En la flanko de la soldato videbliĝis enpikita infanteriana bajoneto, picea pinglo. Glano petis Fazeolinon iom da vakso, piedpreminte la vunditon, eligis la pinglon, modlis la vundon, bandaĝis ĝin per la aranereta bandaĝo kaj ekdemandadis la vunditon:

– Kia regimento?

– Mi ne konas, mi estas analfabeto.

– Kia milito ĉi tie okazas?

– Centjara.

– Oho! Kun kiu vi luktas?

– Bedo kontraŭ bedo.

– Inter si?

– Nome.

– Kaj kiaj estas viaj malkonkordoj?

– Mi mem ne scias. Miloj da niaj fraĉoj jam oferis siajn kapojn, eĉ pli da infanterianoj pereis, sed ne videblas, ne aŭdeblas la fino de ĉi interbatado. Tia verŝajne estas la volo de ambaŭ sinjoroj Sabalbon–Sabalbonegoj, – prononcante ĉi nomon, la rajdanto eĉ tremis pro timo.

– Kial ambaŭ?

– La infanterianoj ankaŭ havas tian reganton.

– Hej vi, kion vi esperas gajni en la milito?

– Nenion, – ekkoleris la kavaleriisto. – Mi nenion volas krom reveni hejmen kaj ekvidi miajn infanojn.

– Sed via reganto parolas tute kontraŭe.

– Do li estas reganto. Kaj kiu vi ambaŭ estas?

– Ni... – Glano jam emis ion mensogeti, tamen detenis sin: lin rigardis riproĉaj okuloj de Pizeto. – Ni estas viaj bonaj amikoj.

– Disvastigu al neniuj, mi rakontos al vi, – komencis la kavaleriisto. – Tio estas malnova historio. Ni vivis tre pace. Nur memorinte la pasintecon, ni nomis sin kavaleriistoj kaj infanterianoj. Sed en nian landon vagis tiuj du strangaj Sabalbonoj: unu ruĝa kun nigraj punktoj, kaj alia – nigra kun ruĝaj punktoj. Altrudiĝis kaj nomis sin niaj regantoj. Unu diris, ke infanterianoj ekestos regantoj de la tuta Reĝlando de Faboj, kaj la alia parolis kontraŭe, ke sukcesos kavaleriistoj. Kaj ni stultuletoj obeeme interbatas! Jam



cent jarojn! – La vundito grimpis pli proksimen, kovris sian buŝon per mano kaj flustris: – Oni diras, ke ili ambaŭ tute ne similas al kavaleriistoj, aŭ infanterianoj.

– Do kial vi obeas tiujn vagabondojn? – miris Glano.

– Kaj kial vi kreis tian kanton por Sabalbono? – eniĝis Fazeolino. – Kantante ĝin, kavaleriistoj pluan centon da jaroj militos.

– Li minacis al mi per sabro, – provis senkulpigi sin Glano, sed Pizeto pugnotuŝetis lian flankon kaj diris:

– La kapo de nia Glano pro diversaj inventaĵoj kaj nomoj tiel turniĝas, ke li iam forgesas, kio estas farenda.

La amikoj levis la vunditon sur la ĉevalon kaj rajdis foren. En densa agrostidaro ili subite estis ĉirkaŭitaj de la fazeolaj infanterianoj.

– Manojn supren! Kapojn enŝultren! – ordonis la estro.

La infanterianoj kunligis liajn manojn kaj irigis ilin en sian terenon.

– Mi vidos, kion vi nun ekkantos, – finfine rekompencis Glano.

– Kaj mi vidos, kiel vi sian pereon priskribos, – mankinte paciencon refutis Pizo.

– Vi nur pro sia ŝelo tremas, – ne koncedis Glano.

– Kaj vi nek sin gardas, nek aliajn kompatas.

– Kaj vi estas malkuraĝulo!

– Kaj vi estas kurbnazulo!

– Sensciulo!

– Kaj vi pripensas tiom da nomoj, ke vi mem komplikiĝas, forgesinte, kiel sin nomigis. Fanfaronulo!

Kaj vi estas tia, vi estas alia, kaj vi tiel, kaj vi alie!.. Kaj ekkverelis ili, kaj interinsultadis ili – jam estis ili proksime de interbatado. La infanterianoj devis silentigi ilin per kladoj. Aŭskultante ilin, Fazeolino ege ruĝiĝis kaj diris:

– Ĉu vi ĉiam tiel kondutas?

La fierantoj silentis.

– Kiam ĉio bone sukcesas, vi estas amikoj, kaj kiam ĉio malboniĝas vi ekestas malamikoj, – insultis ilin Fazeolino. – Ni devas esti unuiĝintaj, ja ni estas militkaptitoj.

– Bonvolu pardoni min, – pardonpetis Glano Pizon. – Mia kapo sufiĉe longe estis truhava, do eble ventoj trablovis mian cerbon. Mi tiel plu ne faros.

– Mia flanko ankaŭ estis truoza, mi ankaŭ tiel plu ne faros.

La infanterianoj fermis Fazeolinon en modlitan argilan fortreson kaj ambaŭ amikoj estis pelitaj al bela tendo, farita el renversita flava floro de tulipo. Ĉe la tendo sidis la estro de infanterianoj. La vundita kavaleriisto estis dirinta veron: ĉi tiu Sabalbono estis

kun militjako buntigita per ruĝaj punktoj kaj surkape li havis bluan akonitan kaskon. Lin akompanis eĉ du servistoj, kun alkroĉigitaj krucoj kaj meritsignoj. Nur tiamaniere li malsamis al la estro de kavaleriistoj.

– Pafmortigi la spionojn! – krietis li al la infanterianoj.

Glano kliniĝis al li kaj diris:

– Aŭskultu, reganto, ĉu vi ne tro urĝas? Mi estas mondiskala korespondanto, majstro kaj doktoro de revuaj aferoj, kaj ĉi tie estas mia amiko, al neniu komparebla poeto Ĉevalkanto. Ni deziras al vi, ke vi ne sufiĉu lokon por siaj ordenoj kaj krucoj sur la tria akompananto!

– Mi pardonpetas, ege pardonpetas, mi ne konis, ke vi estas bojaroj de transmara deveno. Bonvolu internen.

Pizeto pinĉetis Glanon kaj demandis:

– Ni ree malfavore enmiksiĝis. Ĉu mi nun devu versadi turklingve por tiu stulta ekstravaganciulo? Mi senprokraste konfesas, ke mi ne konas eĉ unu turkan vorton.

– Ĉu vi opinias, ke li konas?

La tendo estis sternita per bonodoraj tapiŝoj el rozfloraj folietoj, ĉio estis ornamita per armiloj kaj bildoj. Alkurintaj servistoj alportis pipojn kaj tasojn de kafo. Glano komferte sidiĝis kaj solene elparolis:

– Ŝakar makar tara – raj.

Pizeto kaŝis sian rideton malantaŭ la polmo, kaj simulante paroksismon de nazkataro, ankaŭ tre solene respondis:

– Makar ŝakar rata–taj.

La estro de la infanterianoj malfermis la buŝon, elpufigis la okulojn kaj nur post tuta duonhoru regajnis paroladkapablon:

– Mi komprenis vin tre bone, sed mi preferus, ke vi uzu la faban lingvon, ĉar miaj regatoj povas miskompreni vin kaj pli malbone plenumi viajn dezirojn.

Glano okulsignis al Pizo kaj tradukis liajn vortojn:

– Mia amiko honore al vi kreis versaĵon, kiu nomiĝas “ La hororo de malamikoj ” nur li ne povas deklami ĝin mem.

– Mi permesas fari tion al vi, – fiere respondis la reganto.

Glano tusetis kaj ekkriegis:

Nigrovanga, ruĝmakula,

Sabalbono pufokula,

La fabara altsinjoro

Sabalbono la Senkora.

– Pro tia ofendo mi ordonos enkanonigi vin ambaŭ kaj pafi kontraŭ la vento!

– Ĉi kanton li kreis por timigi viajn malamikojn, por

ke ili tremu, kiel folioj de tremolo.

Aŭdinte la eksplikon, la infanteria gvidanto ankaŭ ekŝatis la kanton. Li ordonis ĉiujn siajn soldatojn plej urĝe ellerni ĝin kaj Glano estis ordonita registri lian paroladon kaj dissendi ĝin al la revuoj de la tuta mondo:

– Mi estas sola reganto de la Faba Reĝlando de la Lando de Malvirtoj kaj mi emas neniun pli supran agnoski. Nome mi estas la altsinjoro de ĉiuj faboj komparebla al neniun – Sabalbon'–Sabalbonego. Mi disprenigos tiun falsnomulon vestaĉiĝintan per araneaĵoj, mi devigos lin glutadi la plandumon de sia ŝuo! Sed tio estos nur komenco. Poste mi ekmilitos kun la tuta mondo. Antaŭen, virĉjoj, ĝis la definitiva venko!

Ĉiuj servistoj eksaltis, stariĝis sur siaj manoj, movaĉis per suprenlevitaj piedoj kaj kriaĉis:

– Hura al Sabalbono!

Tia estis ilia milita saluto.

Glano kaj Pizo estis enigitaj en alian tendon, faritan el blanka lilia floro. Sidiĝis la amikoj kaj longe ridegis.

– Diru al mi, – ekparolis Glano, – ĉu mi ankaŭ aspektas tiel stulta, kiam mi fanfaronas kaj mensogas?

– Stulteta, – diris Pizeto. – Sed mi ja ne rajtas juĝi.

– Hej, fraĉjo, ne konvenas por ni ambaŭ mensogi. Ja tio estas stultula priokupo.

Glano deziris rakonti al Pizeto ĉion pri si, de komenco ĝis la fino, sed Sabalbono forkondukis ilin por inspekti la fortikaĵojn.

En profundaj tranĉeoj sidis miloj da fazeoloj – infanterianoj. Ili estis armitaj per agrostidaj pafiloj, ĉe kiuj estis alkroĉitaj bajonetoj el piceaj pingloj. La soldatoj estis ĝismorte tediĝintaj, dormis ie ajn, sed eĉ dum sonĝo movaĉis per piedoj, donante al sia estro militrespekton. Pli fore de la tranĉeoj staris eglanteria barilaro kaj en ĝin estis enmetitaj kanonoj kun tuboj el leontodoj, egopodioj kaj sambukoj. Tuboj de diversaj kalibroj! Postfronte rampadis kolonoj de kirasmaŝinoj – grandegaj helikoj. Sur ili sidis fazeoloj – tankistoj.

– Pro ili mi ne povas eki la atakon. Ĉiufoje ili malfruiĝas por la batalo. Sed tio ne estas ĉio. Miaj militinĝenieroj kaj sciencistoj preparas armilon de nova speco. Baldaŭ ni ekpafos tiujn kavaleriistojn el la areo.

Sabalbon'–Sabalbonego kondukis ilin en profundan subterejon, elfositan de talpo. Ĝiaj muroj estis kovritaj per lumanta putraĵo de frakseno. En verdeta neflagranta lumo laboris multego da militsciencistoj. Ili elblovdadis sapvezikojn kaj penadis alkroĉi al ili grandajn korbojn. Apenaŭ tuŝitaj per hoko, la vezikoj tuj disŝiriĝadis kaj ĉiujn ŝprucigadis. Tiam la sciencistoj kuregadis al la desegnaĵoj, eniginte la

nazojn, ekzamenadis ĉiujn kalkulojn kaj komencadis ĉion denove.

Ekvidinte Sabalbonon, ili ekstaris sur manoj, movaĉis per piedoj, ekkriis la batalmoton ka reeklaboris.

– Bonvolu pardoni, – demandis la Praktika Pizeto, – kial ili salutante levigas piedojn, sed ne manojn?

– Tio estas mia inventaĵo, – fanfaronis Sabalbono, – soldataj manoj devas ĉiam esti pretaj por kapti armilon. Kaj tio ne estas ĉio. Ni malsupreniĝu en la subterejon. Bonvolu.

Malantaŭ dekkvin duoblaj pordoj, gardataj per cent gardistoj, sidis aliaj flaviĝintaj sciencistoj kaj ion desegnadis. Ili ne ekstaris sur manoj, nur tuŝetis per piedoj siajn kalvajn kapojn kaj reprofundiĝis en desegnadon. Tio montris la specialan bonvolon de Sabalbono por ili.

– Tiuj ĉi viroj de scienco inventadas la aparaton por altiri la Sunon al la Tero. Se ili sukcesos, ni ne nur dispecigos niajn malamikojn per bomboj, sed ankaŭ bruligos kvazaŭ pajlon.

– Ĉu tio decas?! – tremis Glano. – Se vi altiros la Sunon, bruliĝos la tuta Tero kaj kune ankaŭ ĉiuj ni.

– Ne gravas, tamen niaj malamikoj estos bruligitaj pli frue! Mi ne dubas tion.

– Ĉu ne estus pli bone interkonsenti pace? – nekuraĝe demandis Pizo.

– Tio estas ebla, sed por kio tio estus bezonata? Vi, poetoj, nenion komprenas. Armiloj estas forĝataj por milito, ne por ludoj. Se soldatoj pereas en milito, tiel devas esti. En mia regno nur malsanuloj kaj virinoj mortas en litoj.

– Mi pardonpetas, kion vi faros post kiam vi militakiros la mondon?

– Unue, la mondo estas kreita por ke iu ĝin militakiru. Kaj kiam mi havos ĝin en miaj manoj, mi komencos militon kontraŭ la Luno.

– Kaj post tio?

– Por mi ne gravas, kun kiu kaj kontraŭ kiu mi militu. Mi konas, ke soldata honoro kaj krucoj estas akireblaj nur dum milito, do tial mi batalas.

– Mi ankaŭ deziras demandi, – modeste intermetis sin Pizo. – Ĉu viaj sciencistoj ne povus pripensi tian maŝinon, kiu kreskigus panon, aŭ, alivorte – plugus novalon?

– Ili povas, sed ne volas. Pro tia laboro ili ricevus nek ordenojn, nek monon.

Rebruis trumpetoj kaj rekomencis la batalo. Marŝadis vicoj de araneoj – infanterianoj, kiel ŝafaj gregoj kaj faladis sub la kavaleriistaj sabroj. Pro la bruego ĉiuj surdiĝis. Kanonoj de ĉiuj kalibroj, ŝarĝitaj per la plej forta pulvo de diabla tabako bruis kaj bruis ĝis la vespero.

Kiam unu obusero disŝiris la teksaĵon de la tendo kaj elbatis picon el la dentoj de la brava militestro Sabalbon'— Sabalbonego, li ekkriegis per absolute nekutima voĉo:

– Armistico! Armistico! La soldatoj devas ripozi.
Nun Glano komprenis, kun kiu li amikiĝis.

(daŭrigota)



"La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj" estas libro de litova verkisto Vytautas Petkevičius (1930 – 2008). Li estas sufiĉe konata kaj precipe fama pro siaj porinfanaj kreaĵoj.

La Turka Tombejo en Malto

Sude de Malto, pli precize ĉe la urbo Marsa apud la ĉefhaveno, troviĝas belaspekta kvankam kurioza konstruaĵo, konata kiel 'La Turka



Ĉeftombejo de Malto



La malta arkitekto Emanuel Luigi Galizia

Tombejo".

Oni priskribas ĝin kiel "simbolon de eterna amikeco inter Turkujo kaj Malto" kaj "monumenton de nia komuna fiereco krom historia kaj arkitektura heredaĵo, ĉiam kun la jenaj preta por esti proponita kiel turisma celo." Oni foje nomas ĝin "La Otomanan Taj Mahal" aŭ "La Maltan Taj Mahal" pro ĝia ekscesa stilo orienta.

Ĉi tiu tombejo estis konstruita post peto de la Sultano Abdelaziz dum sia vizito al Brit-regita Malto de



Artisma arkitekturo de la Turka tombejo



La tombejo ekstere

la jaro 1867 kaj desegnita de la fama malta arkitekto Emanuel Luigi Galizia en 1873-74. Ĉi monumento, farita el la malta kalkŝtono, estas eterna ripozejo ne nur de Turkaj martiroj sed ankaŭ de homoj el diversaj landoj.

Ĝiaj kvar minaretoj kaj ekzotikaj ajloformaj kupoloj kiel ankaŭ ĝia ĝenerala fomo faris el ĝi unikan vidindaĵon en la malta arkitektura historio.

Pro ĝia originaleco, Galizia estis honorigita per

verkis kaj sendis Carmel Mallia el Malto

la "Ordeno de la Medji" far la Otomana Sultano. Nuntempe ĉi ripozloko falas sub la respondeco de la Turka Registaro.

Kriozas krome ĉi tiu notindaĵo, ke dum la Otomana Sultano estis Islamano, lia konsulo, kiu prizorgis la realigon, estis Juda (Maum Duhani Efeendi) dum la malta arkitekto estis Katolika.

Ene de la konstruaĵo troviĝas marmora tabulo kun la jenaj vortoj en la franca lingvo:

- Kiel la suno subiras kaj la steloj malaperas, tomboj sigelitaj de a morto estos ĝenitaj kaj el ĉi tiu polva lito resurektitaj el la dormo; ili aperos kiel gefiloj de fido kaj de preĝo.

- Ĉu Dio ne estas sufiĉe forta por revivigi la mortintojn?

- Konstruita en la jaro 1290 de la Hegira dum la regado de lia Imperia Majesteco Abdul Aziz Khan, Imperiestro de la Otomanoj. Naoum Duhany Efeendi, ĝenerala Konsulo en Malto.

- E.C.Galizia, Arkitekto.

Emanuel Luigi Galizia (prononco: Emanuĉel Lūiĝi Galicja) (1830-1907) konsiderita kiel la malta ĉefarkitekto dum la dua duono de la deknaŭa jarcento. Liaj elstaraj konstruaĵoj en Malto (krom multaj aliaj) estas: La Ĉeftombejo, Vilao Alhambra kaj Pordo Victoria (vidu bildojn ĉiapude).

verkis kaj sendis **Carmel Mallia** el Malto

6.1.2022



Vilao Alhambra



Pordo Victoria

Al la homo, kiu ĝis tiam aŭdis eble nur pri gonoreo, tio vekis en la animo panikon kaj hororon. Kaj neniu sciis, kiu eldiris unue vorton “Esperanto”.

– Kio ĝi estas? – unu la alian demandadis la vilaĝanoj.

Pri Esperanto iuj ion aŭdis, sed nek unu bone imagis, kiel ĝi aspektas. Estis neniu, kiun oni povis demandi.

La instruisto Salomono sin kaŝis en tiu sama nokto, kiam estis eldirita tiu vorto. Kaj poste jam neniu vidis lin.

Timigitaj virinoj, kondukante geinfanojn, iris al kuracisto Staseo kaj petis, ke tiu vakcinu ilin.

– Vivu vi pure kaj neniu viruso kaptos vin! – insultis tiu.

Kuracisto poste trankviligis ilin:

– Esperanto furiozas nur en urboj, sed en vilaĝoj ĝis nun estas trankvile.

Vespere de tiu ĉi tago mortis leterportisto Jonas, nomata de ĉiuj “astronomiisto”, ĉar li sola en la vilaĝo portis malhelajn kontraŭsunajn okulvitrojn. Li iris surkorte, puŝiĝis al fosto, falis surteren:

– Esper..., – nur eldiris. Kaj estingiĝis.

Maljunaj viroj elpoŝigis botelon da brando kaj pasintecon rememoris.

– Nek sub la ruso, nek sub la germano oni aŭdis pri Esperanto, – parolis pensiulo Simeono. – Kaj ĉu io mankis?

– Sed kion parolas kleraj homoj? – scivolis forĝisto Kostas.

Studento Paŭlo ruĝiĝis, sin gratis, skrapis la okcipiton kaj komencis:

– Esperanto aperas tiam, kiam oni havas nenion por fari. Homoj kolektiĝas kaj infektas unu la alian. La scienco nun tiel klarigas, al mi tiel ŝajnas.

Vilaĝanoj interrigardis.

– Kion ni faru? – demandis ili unu la alian, – Ni ne povas sidi tiel... la manojn kunmetinte!

Ekmalĝojis la vilaĝanoj, timtremis...

– Esperantistoj, kio estas ili? – scivolis vendisto Rimas. Li iam aŭdis ion pri la misteraj verduloj, sed neniam li sukcesis renkonti ilin vivajn, pro tio ŝajnis al li, eble tiuj entute ne ekzistas, eble tio estas nur legendo aŭ elpensajo de olduloj.

– Ĉu ni tion bezonas? – eksaltis policisto Kontrimas kaj ektiris pantalonon supren. – Simpla, vica homo povas fini vivon nenion sciante pri Esperanto.

La humoro falis, la vivo iĝis absurda kaj senseca.

– Ĉiuj timas esperantistojn, sed mi... ne. Antaŭ

kelkaj jaroj en la urbo mi preteriris kelkajn el ili – kaj nenio okazis. Strangas tiuj homoj, – parolis studento Paŭlo.

– Unu li, esperantisto, ne estas danĝera, – klarigis studento. – Tamen tiel malofte okazas, por ke oni trovu solan esperantiston meze de Litovio. En grandaj urboj ili amase kolektiĝas kaj atakas homojn.

Virinoj ekploris, olduloj sin krucosignis kaj pli junaj viroj ĉirkaŭrigarde serĉis palisojn por sin defendi.

– Pli ol cent jarojn vagadas tra la mondo Esperanto viruso, – daŭrigis rakonton studento Paŭlo.

– En la ĉefurbo amase svarmas disvastigantoj de viruso. Komence la homoj kompatis tiujn mizerulojn, nun oni evitas ilin de malproksime. Evidentiĝis, ke per Esperanto oni povas infektigi kaj ĝi iĝas daŭre pli agresema. La infektigo disvastiĝas perbuŝe, perorele, perokule... Kuracistoj kaj doktoroj gestadas permane; – medicino tiuĉimomente estas senforta por kontroli tiun epidemion.

– Plej danĝeras! – ekscitinte parolis studento. – Plej danĝere, ke infektigis eĉ geinfanoj, eĉ denaske.

– Mi memoras, foje mi ekvidis esperantiston kaj timiĝinte ekstaris kiel paliso. “Se mi ekpaŝos malantaŭen, li pensos, ke mi timas kaj tuj komencos min postkuri, – pensis mi. – Se mi paŝos antaŭen, li pensos, ke mi volas batmortigi lin kaj li povos frapi min unua.” Esperantisto, sendube, pensis tielsame kaj ne moviĝis de surloke.

Tiel ni staris ĝis sunsubiro. Tiam ni komencis retiriĝi dorsdirekten ĝis ni malaperis unu al alia el okuloj.

– Sed pro kio mi rakontas tion al vi?

Ĉiuj timskuiĝis, iuj kuntiriĝis kaj eĉ ekploris. Bibliotekisto Tadeo rigardis tre scivoleme. Multon li volis demandi. Nur kiel ĉiam, li konfuziĝis, ekruĝiĝis kaj ne trovis taŭgajn vortojn.

Nun jam maturiĝis momento kaj necesis komenci decidemajn solvojn.

– Viroj, ni serĉu palisojn kaj defendu nin kontraŭ esperantistoj, – ekkriis batemulo Zigmas.

– La propono indas atenton, – diris bestkuracisto Mikas kaj manpremis al Zigmas. – Kaj kia estas via opinio?, – demandis li apude starantajn virojn.

Ĉiuj ekstremis kaj ekkriis.

Kaj jen venis vilaĝestro Vaivada kaj silentigis ĉiujn:

– Kion signifas tio, viroj?! Pro kio tiom bruas vi?

– Studento Paŭlo diris, ke baldaŭ venos esperantistoj. Ni devas defendi nin per bastonoj, ĉar ili disvastiĝas viruson, – klarigis batemulo Zigmas.



Ĉiuj ĉirkaŭrigardis. Tamen la studento ne plu estis videbla.

Vilaĝestro Vaivada aŭskultis, cerbumis, sed diris nenion. Li perceptis la gravecon de la afero. Li ĉion komprenis kaj nenion plu demandis... Fine li diris:

– Finu vi, timuloj. Esperanto estas lingvo... nur lingvo, internacia ..., kaj esperantistoj – ĝin parolantoj.

Kaj ili ne estas danĝeraj, neniujn infektas. Esperantistoj havas nur unu malamikon... Ili mem unu al alia.

Tiuj vortoj trankviligis la vilaĝanojn. Ĉiuj ekhontis, mallevis la kapojn kaj disiris hejmen.

verkis kaj sendis **Laimundas Abromas** el Litovio

Facilaj artikoloj el UEA.FACILA.ORG retejo

Feliĉe kaj kontente



Fabeloj en la okcidenta tradicio ofte finiĝas per geedziĝo inter princo kaj princino, aŭ foje inter princo kaj filino de muelisto, aŭ princino kaj aventurema junulo. Ĉiam tiuj fabeloj finiĝas per tradicia frazo de la speco “Ili pluvis feliĉe por ĉiam” aŭ simile.

Lastatempe mi serĉis manieron por diri tiun esprimon en Esperanto. Zamenhof tradukis la fabelojn de Hans Christian Andersen, sed tiuj ne finiĝas per simila frazo kaj fakte ili ne nepre finiĝas feliĉe. La fabeloj de Grimm estis tradukitaj de la fama esperantisto Kabe, kaj en tiuj tradukoj troviĝas jenaj frazoj:

“... nenio mankis en ilia feliĉo ĝis la morto.” [La ora birdo]

“... kaj vivis feliĉe ĝis la morto.” [Sesope oni trairas la tutan mondon]

“... kaj ili ĝoje vivis kune.” [Haĉjo kaj Grenjo]

“... ili ĉiuj vivis feliĉaj ĝis la fino.” [Fidela Johano].

Tiuj esprimoj ne estis elpensitaj de Kabe mem, sed estas tradukitaj el la germana. (Mi dankas al Lenio Marobin el Brazilo pro tiuj ekzemploj.)

Mi petis informojn ankaŭ ĉe la Lingva Konsultejo en Fejsbuko, kie pluraj esperantistoj donis al mi la subajn frazojn el diversaj lingvoj. Ni ne voĉlegos la tutan liston, ĉar vi povos mem legi ĝin.

En la angla: Kaj ili vivis feliĉe por ĉiam poste.

En la finna: Kaj ili vivis feliĉe por ĉiam.

En la franca: Ili vivis feliĉe kaj havis multajn gefilojn.

En la germana: Kaj se ili ne mortis, ili ankoraŭ vivas hodiaŭ.

En la greka: Kaj ili vivis bone, kaj ni pli bone.

En la hispana: Kaj ili vivis feliĉe kaj manĝis perdrikojn.

En la hungara: Ili vivis en feliĉo, ĝis ili mortis.

En la itala: Ili vivis feliĉaj kaj kontentaj.

En la japana: Kaj onidire ili vivis senfine (t.e. longe) kaj feliĉe.

En la litova, pola kaj serba: Kaj ili vivis longe kaj feliĉe.

En la portugala: Kaj ili vivis feliĉaj por ĉiam.

En la rusa: Ili vivis feliĉe por ĉiam kaj mortis en la sama tago.

En la sveda: Kaj poste ili vivis feliĉaj en ĉiuj siaj tagoj.

En la turka: Ili atingis sian esperon, nun ni enlitiĝu.

Cetere, kelkaj legantoj de ĉi tiu artikolo verŝajne demandis sin, kial oni uzas foje la adverbformon “feliĉe”, foje la adjektivan formon “feliĉaj”. La adverbo kun -e rilatas al la verbo “vivis”, kaj priskribas kiel la paro vivis. La adjektivo kun -aj rilatas al la paro mem, kaj priskribas ilin.

Do, kiun esprimon uzi en Esperanto? Ne ekzistas unu fiksita frazo, kiel oni trovas en aliaj lingvoj. Tial, kiam mi mem bezonis tiun frazon, mi decidis uzi la esprimon: “Ili pluvis feliĉe kaj kontente”.

Anna Lowenstein
(kun danko al ĉiuj kontribuantoj)

Novaj vortoj:

adjektivo: vorto, kiu finiĝas per -a en Esperanto, kiu montras econ aŭ kvaliton, ekzemple “granda”, “bona”.

adverbo: e-vorto en Esperanto, ekzemple “bone”, “rapide”, “feliĉe”.

aventurema: deziranta eliri en la mondo por sperti neordinarajn, nekutimajn okazaĵojn.

fabelo: imagata rakonto pri mirigaj okazaĵoj.

Fejsbuko (Facebook): nomo de retejo, kie la homoj interŝanĝas informojn, opiniojn, fotojn ktp.

fidela: restanta ĉiam ĉe la sama amik(in)o, edz(in)o, familio, ŝtato, reĝ(in)o, promeso, idealo aŭ simile, neniam forlasanta tiun, eĉ en malfacila situacio.

konsultejo: loko aŭ retejo, kie eblas peti opiniojn pri iu

demando aŭ problemo.

mueli: rompi grenon aŭ aliajn materialojn en tre malgrandajn erojn; necesas mueli grenon antaŭ ol uzi ĝin por fari panon.

perdriko: manĝebla birdo el la sama familio kiel la kokoj.

princo: filo de reĝo kaj/aŭ reĝino.

t.e.: tio estas

Publikigita laŭ propono kaj permeso de Anna Löwenstein

Fonto: <https://uea.facila.org/artikoloj/lingvo/feli%C4%89e-kaj-kontente-r277/>

Sovaĝaj olivarboj en Cluj / Kolozsvár

tradukis kaj sendis Lenke Szász el Hungario

La olivarbo ne estas planto, kiu kreskas sovaĝe en Rumanio. Ordinara turistoj vidas olivarbon en Grekio, en Turkio aŭ en aliaj mediteranaj landoj. Estas nekutime renkonti sovaĝajn olivarbojn en la transilvania grandurbo, Cluj. La mistero estis solvita de specialistino en historio de la Otomana Imperio, Margareta Rachita Aslan:



En la pluva printempo de la jaro 1603, turka armeo konsistinta el ĉ. 10.000 soldatoj postenis ekster

la muroj de la urbo. Ilia komandanto estis Bektaŝ paŝa. El kroniko estas sciata, ke dum la unuaj tagoj de ilia alveno pluvegis abunde. Soldatoj de la otomana armeo kunportis en saketoj diversajn kuracherbojn kaj fruktojn konservitajn per sekigo. La sekigitaj fruktoj de olivarbo estis bonegaj kuraciloj kontraŭ malvarmumo, diareo kaj aliaj malsanoj oftaj dum la militaj kampanjoj. La fruktoj enhavantaj vitaminojn, mineralojn fortigis la imun-sistemon, kuracadis malsanojn. La semoj de la fruktoj manĝitaj estis disjetitaj, kaj en la tero, pro la pluvego malsekigita, ili ĝermis kaj dum jaroj kreskis en tiu loko sovaĝaj olivarboj. Poste, dum jarcentoj, la arboj plimultiĝis el la falintaj fruktoj.



Jen la mistero de la sovaĝaj olivarboj en Cluj solvita .

tradukis kaj sendis **Lenke Szász** el Rumanio

Resumo de artikolo el loka gazeto (Cluj, Rumanio)

Kalendaro 2022 (sur unu paĝo)

KALENDARO 2022

(SUR UNU PAĜO)

| TAGOJ | | | | | AUG | FEB | JUN | SEP | APR | JAN | MAJ |
|-------|----|----|----|----|-----|-----|-----|-----|-----|-----|-----|
| | | | | | | MAR | | DEC | JUL | OKT | |
| | | | | | | NOV | | | | | |
| 1 | 8 | 15 | 22 | 29 | LUN | MAR | MER | JAŬ | VEN | SAB | DIM |
| 2 | 9 | 16 | 23 | 30 | MAR | MER | JAŬ | VEN | SAB | DIM | LUN |
| 3 | 10 | 17 | 24 | 31 | MER | JAŬ | VEN | SAB | DIM | LUN | MAR |
| 4 | 11 | 18 | 25 | | JAŬ | VEN | SAB | DIM | LUN | MAR | MER |
| 5 | 12 | 19 | 26 | | VEN | SAB | DIM | LUN | MAR | MER | JAŬ |
| 6 | 13 | 20 | 27 | | SAB | DIM | LUN | MAR | MER | JAŬ | VEN |
| 7 | 14 | 21 | 28 | | DIM | LUN | MAR | MER | JAŬ | VEN | SAB |



AŬTORO : HUMBERTO BORTOLOSSI

La Tuta Matematiko

Luno, La Patrino

Luno nia patrino
Loĝas en ĉielo
Amas kaj zorgas nin
Ĉiam kun mielo.



verkis kaj sendis
Gairik Patranobis
el Kalkato, Barato

Helpas ŝi nokte.
Per mola lumo,
Promenante dum nokto
Sole sen bruoj.

Ridetas ŝi konstante
En ĉiu sezono,
Nigraj nuboj kovras ŝin
En la musono.

Aperas ŝi ĉiam brile
Forigante nubretojn
Tiel ŝi instruas nin
Kiel forigi problemojn.



Ŝercoj



LA AŬTORO

Adoleska Amando: Paĉjo, mi decidis esti aŭtoro.

Kruko: Tre bona ideo, Amnjo. Pri kio vi verkos?

Amando: Mi komencos verkante biografion pri vi.

Kruko: Tio povus bone vendiĝi. Mi ja havis interesan vivon kaj sukcesan karieron.

Amando: Kaj eĉ pli, vi estos la patro de fama aŭtoro!

TALENTO

Baniko nostalgias: Mi neniam forgesos tiun talento-spektaklon kiam mi estis en la gimnazio.

Kruko: Ĉu vi prezentis ion?

Baniko: Jes, mi muzikis. Kaj kiam mi ekludis, la tuta spektantaro freneziĝis.

Kruko: Ili tiom aprezis, ĉu?

Baniko: Fakte, ili batis min kaj komplete disrompis mian akordionon!

LA LONGEDAŬRA AMPOLO

La plafonlampo estingiĝis, do Kruko devas instali novan ampolon.

Kruko: Jen, mi aĉetis tian LED-ampolon. Nekredeble, sed laŭ la garantio, ĝi daŭros dek jarojn!

Jozefino: Tre bone, karuĉjo. Atentu sur la ŝtupetaro.

Kruko grimpas sur la ŝtupetaron, malŝraŭbas la estingitan ampolon, kaj komencas enŝraŭbi la novan

en la ampolingon.

Subite, la ampolo glitas de liaj fingroj, falas ĝis la planko, kaj frakasiĝas je mil pecetoj.

Jozefino: Nu, mi supozas ke tio malvalidigas la garantion, ĉu...?

tradukis **Rikardo Cash** el Francio
publikigita kun lia permeso

Fonto: esperanto-anekdotoj@googlegroups.com




Krucvortenigmo

HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Ĉefurbo de Afganio; 6. La nombro 20; 11. Regno de la Arabia Duoninsulo; 12. Femala, insekse; 13. Transigu objekton en alian lokon; 14. Haroj sur la mentono; 15. Prepozicio, signifanta "koncerne al"; 16. Ripoztago.; 17. Vokalaj literoj de Kabe; 18. La litero L; 19. Iris rapide; 20. Havi seksan aŭ koran inklinon; 21. Neĝo firmiĝinta al glacio; 22. Konsistantan el pura oro; 23. Seulo estas ĝia ĉefurbo; 25. Ligna tabulo, reprezentanta Kriston aŭ sanktulon; 26. La ĉefa heroo de Iliado; 27. Planedo inter Saturno kaj Neptuno (akuzativo).

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Malsimpla; 2. Eroso, Cupido; 3. Salivumi; 4. La nombro 1; 5. La litero L; 6. Voĉe komunikis; 7. Ĝi havas domojn kaj stratojn; 8. La patro de Jesuo; 9. Prepozicio indikanta lokon; 10. Alkaloido, ekstraktata el kafo (akuzativo); 12. Amplekso de variado; 14. Ĉefurbo de Svislando; 16. Diino de venĝo; 17. Ĉefurbo de Jordanio; 19. ___ vi fartas? 20. Grupon, ensemblon; 21. Unua duono de Friulo; 22. Sepa, ___, naŭa; 24. La centro de



Koĥo; 25. Simbolo por iridio je kemio.

Fonto: Semajno de Enigmoj #8
<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo troviĝas en paĝo 31)

(daŭrigata)

4. Realisma konkludo

Ĝis nun mi montris kiel en la kampo de instalado en la mondo de interlingvo inter homoj apartenantaj al malsamaj lingvogrupoj la projekto Esperanto malsukcesis kaj la projekto "angla lingvo kiel dua lingvo por ĉiuj" sukcesis⁴². Tio okazis en la lastaj 130 jaroj proksimume kaj pri tio ne eblas diskuti.

La Esperanto-movado nuntempe ankoraŭ ekzistas kaj laboras por Esperanto, sed ĝi estas la ombro de tio, kio ĝi estis en la komenco de la pasinta jarcento, kiam temas pri publika agnosko. "Ĉu Esperanto ne jam formortis?" Tion demandas de vi parto de la homoj, kiuj iam aŭdis pri ĝi. La alia parto ne demandas, ĉar ili neniam aŭdis pri ĝi.

Esperanto disvastiĝis tutmonde sed restas tre marĝena fenomeno. Ĝi adaptiĝis al la novaj retaj komunikeblecoj kaj iom reviviĝis pro la interreto, kiu donas al individuoj la potencon komuniki.

Certe la ideo pri justa kaj neŭtrala solvo en la lingva kampo restas kiel bela idealo, kiu tamen ne trovas en la nuna mondo multajn sekvantojn. Sed la plej granda parto de la mondo pensas, ke prefere oni lernu la lingvon de la plej granda fortulo de la momento.

La fakto ke Esperanto malgajnis ĝis nun kaj la anglalingvaj landoj gajnis, ne signifas ion alian. Tio ne signifas, ke la angla estas pli facila ol Esperanto kaj pli taŭga kiel monda interlingvo. Tio ne signifas, ke esperantistoj malpravas kaj la anglalingvanoj pravas. Tio ne signifas, ke nun ni devas agnoski ian etikan superecon al la gajnintoj, kiel multaj emas fari.

Cetere ankaŭ inter la pli junaj esperantistoj, antaŭ la indiferenteco de la mondo al niaj ideoj, la reago estis, ke ni ne celas disvastigi Esperanton kiel duan lingvon por ĉiuj sed nur zorgi pri nia propra ĝardeneto. "Evoluigi nian propran kulturon" oni diras. Tion diras kaj la Manifesto de Raŭmo⁴³ kaj en alia formo, per insistado pri amikeco tra la mondo je individua nivelo la ret-paĝoj de la plej grandaj Esperanto-organizaĵoj. Kun tia Esperanto, kiu rezignis pri siaj idealaj celoj, ni ne volas havi ion komunan.

Estas malfacile antaŭvidi la estontan tempon kaj kiel la nuna hegemonio de la angla povos ŝanĝiĝi. Verŝajne tio postulas la ekeston de alia potenco centro. Ĉu Ĉinujo povos ludi tiun rolon? Ĉu iu alia?

Tio, kion la movado realisme povas fari estas, laŭ mi, vivteni sin kaj la ideon pri justeco en la kampo de lingvoj kaj ne perdi la idealan rajton ekzisti per rezigno

pri la celo estigi revolucion en la direkto de justeco en la kampo de lingvoj. La certigo de lingvaj homaj rajtoj restas la pravigo de la Esperanto-movado.



(fino)

artikolo de Renato Corsetti el Britio

Fonto: https://www.academia.edu/37359946/Corsetti20180627_fina?email_work_card=view-paper

⁴² Plej klare diras tion Jonathan Pool: "The closest thing to a universal human language today is English, he added, but English in many ways fails to live up to Zamenhof's dream, which was to help create a more egalitarian world." Ker Than (2009), *L.L. Zamenhof: Who He Was, Why He's on Google*, intervjuo al Jonathan Pool en *National Geographic*, 15-12-2009.

⁴³ La Manifesto de Raŭmo estis akceptita okaze de la Internacia Junulara Kongreso en Raŭmo, urbo en Finnlando en la fino de julio 1980: La dua sekcio diras: "Ni kredas ke:

- la oficialigo de Esperanto estas nek verŝajna nek esenca dum la 80aj jaroj – oni havu alternativajn celojn;
- la faligo de la angla lingvo estas nek tasko nek zorgo de la esperantistoj: finfine la angla rolas nur kiel help-lingvo, analoge al la franca siatempe (eĉ malpli grave ol iam la franca mem); Zamenhof neniam proponis al la Esperanto-movado kiel celon kontraŭstari la francan, ĉar por Esperanto li antaŭvidis pli valoran alternativan rolon.

Renato Corsetti : Naskiĝis en 1941. Post laboroj en kelkaj kampoj iĝis profesoro pri psiĥolingvistiko en la universitato „La Sapienza“ en Romo, Italujo. Okupiĝis pri psiĥolingvistiko, socilingvistiko, esperantologio. Verkis centon da artikoloj pri tiuj temoj kaj dekon da libroj en la itala kaj en Esperanto. Aktivulo en la loka, la landa kaj la internacia movado estas honora prezidanto de TEJO kaj honora membro de UEA.

EKSTERORDINARA KUNVENO

La pigo unua aperis en la vilaĝo:

- Novaĵo! Eksterordinara novaĵo - okazos kunveno ...

Iu interrompis ĝin:

- Silentu, vi portas nur klaĉojn! ...

Sed ĝi daŭrigis la flugadon de korto al korto:

- Estos kunveno! Estos...

- Pri kio?

- Pri la ĝisnuna estraro...

- Tio ne koncernas nin. – diris iu.

En tiu momento alvenis la kuriero – la Blanka Kolombo.

- Mi rajtas inviti vin al eksterordinara kunveno morgaŭ matene sur la herbejo antaŭ la arbaro. Sendu reprezentantojn! Ni diskutos la solan punkton "La nuna estraro!"

La kolombo forflugis. La vilaĝo similas abelujon kun kvietaj, sed senĉesa zumado.

Frue la sekvan tagon alvenis reprezentantoj de ĉiuj bestoj kaj birdoj. La timo estis granda, sed ankaŭ la scivolemo kaj espero, ke io pli bona okazos.

La Maljuna Ĉevalo malfermis la kunvenon:

- Geamikoj, ĉiujn tedi la nuna estraro. Nome de la ĉevaloj, mi proponas, ke ni elpelu ilin el la vilaĝo kaj ni regu.

- Kiuj "Ni"? Ĉu ni elpelos ilin kaj vi, la ĉevaloj, sidos sur iliaj oraj tronoj?

- Reprezentantoj de ĉiuj... Ni vivas en malbonaj kondiĉoj, sed iliaj hejmoj similas al reĝaj palacoj. Ĉu tio estas ĝusta?

- Jes!...

Araneoj kviete rapidis teksu novajn retojn.

- Ili donas al ni malmulte da manĝaĵo, kaj por ili estas multe kaj el la plej bona. Ĉu tio estas prave?

Katoj silentis, ili estis dorlotbestoj kaj profitis ĉion haveblan...

- Jes! - oni aŭdis de ĉie.

- Ili ŝarĝas nin per multe da laboro ...

- Jes!

- Laboro estas laboro, ni ĉiam konsciencie plenumis niajn devojn - diris mallaŭte iu el la hundoj.

- Iu azeno diris: - Oni batas nin! Mi proponas, ke kaj ni batu ilin.

- Ni mortigu ilin!

Iuj el la porkoj, timigitaj de la minacoj, komencis kviete foriri. Ili dikiĝis pro tio, kion ili sekrete ricevis.

Post ili foriris la hundoj, la katoj...

- Geamikoj, - diris la Ĉevalo denove: - Mi hontas pri tio, kion mi aŭdas. Kial vi krias?

Kiaj estas tiuj malbonaj vortoj, kiujn mi aŭdas? Ni ne estas kiel ili. Mi proponas, kiel solvon: Pelu ilin el la vilaĝo, kaj faru iliajn orajn domojn infanĝardenoj por ĉiuj infanoj. Ĉu vi konsentas?

- Hura! –oni aŭdis.

La amaso ekiris al la vilaĝo por plenumi la taskon.

Revulo**NIGRA KVADRATO (fabelo)**

En subteretaĝo vivas kato. Tempo al tempo mi donis al li fiŝon. Iufoje mi decidis klerigi tiun beston. Mi demandis lin: "Kion vi pensas pri <Nigra kvadrato> de Maleviĉ?" - Li demandis min: "Ĉu, tio estas viando?"

- Ne, tio estas artaĵo!

- Ho, bone. Tiam vi mem manĝu vian <Nigran kvadraton>, sed al mi donu blankan kvadraton de lardo kaj ruĝan kvadraton de kolbaso.

Hi, ve! Mi rakontas al la kato pri arto, sed li pensas nur pri lardo kaj kolbaso.

Tiu kato estas malklera, vulgara, sed li ne solas. En mondo estas aliaj katoj. Ĉe mia pordo mi renkontis ruĝan katon Suneto. Mi demandis lin: "Kion vi pensas pri <Nigrakvadrato> de Maleviĉ?"

- Vi eraras! Per la kapo mi ne pensas, per la kapo mi manĝas.

Mi kuris al la hejmo. Tie mi prenis fiŝon kaj donis ĝin al la kato. La kato formanĝis tiun fiŝon. Poste sidante sur benko kaj ĝuan tesunon li aŭskultis prelegon <<Nigrakvadrato>> de Maleviĉ.

Pasis semajno. En najbara korto vivas blanka kato Neĝero. Matene li kuras al mia hejmo. Lin haltigas hundo Trezoro:

- Neĝero, kien vi kuras?

- Mi kuras al prelego <<Nigra kvadrato>> de Makevuĉ.

- Ĉu tiu prelego estas interesa?

- Tiu prelego estas enua, sed ĝi tre bongustas.

Revulo

humuraĵoj de **Nikolaj Neĉaev** el Rusio

Unua premio pri humuro

Historio estas racia rakonto, kiun akademiuloj knedas per la eltrovaĵoj en siaj manoj. Iuj diris, ke meteoritoj falis unue kaj portis akvon al nia tero. Aliaj diris, ke grandega fajroglobo malvarmiĝis dumtempe, kreante la etajn unuajn estaĵojn, plantojn kaj bestojn, kaj poste homsimilajn prapatrojn de ni. Kelkaj diris, ke ĉiuj kontinentoj en la komenco estis unuigitaj, sed disiĝis laŭtempe. Kion ajn akademiuloj diris, ili diris tion nekomplete. Ĉar antaŭ ĉi tiu tero, ekzistis cirkla universoj, paralelaj unu al la alia. Antaŭ ol oni inventis la lingvon, kiu estas la resonanca instrumento de racio kaj penso, ĉio estis en senfina kaj interplektita stato. Fakte, la faktoj ne bezonis klarigi sin. Ili estintis. Jen la lulilo, kerno, semo de ĉiuj ĉi, kiel ajn vi nomas ĝin, ĝi estis meta-tero. Ĝi nomiĝis VORDONISI. Alivorte, plej anataŭe ol Mu, Atlantido, Lemurio ktp...



En unu el la meta-universoj de la supra-ĉieloj, likvaĵo, simila al maro sed tute en malsama koloro, bobelis. Likvaĵo, kiu ne similis al la koloroj de la tero. La nunaj koloroj disiĝis de ĉi tio. Kaj ankaŭ disiĝis miliardoj da vezikoj. Iu el ili venis kaj algluiĝis ie en la nigra spaco. Ĝi vastiĝis kaj kreskis. Ĝi formis la grandegan oceanon ankaŭ nomata Marmora Maro. Ĝi

estis oceano miliardo da fojoj pli granda ol nia nuna mondo. Kelkaj vezikoj kreviĝantaj el tiu oceano da vezikoj solidiĝis kaj artikiĝis unu super la alia aŭ unu apud la alia, unu post la alia. Formiĝis teroj kaj rokoj. Aliaj vezikoj formis plantojn, kaj aliaj vezikoj formis la unuan bestaron, sed malsimilaj al iu besto aŭ planto de nia hodiaŭo. Antaŭ ol tio, kion vi nomas homo, kiu havis nacion, religion, limojn, identecon aŭ nomon, ekzistis la Vordonisianoj. Ĉi tiuj ankaŭ estis estaĵoj, kiuj estis formitaj per la artikulacio de moviĝantaj vezikoj kaj havis vivdaŭron de centoj da jaroj. Ili ne estis plene homaj, nek humanoidaj, nek simioj, ili estis estaĵoj kiuj ne kongruis kun ajna koncepto, kiun vi konas. Ili ne havis nomojn. Eĉ iliaj nomoj estis donitaj longe pli poste: VORDONISANO.



La Vordonisi civilizatio estis formita en tri fazoj kaj en tri lokoj: Fluganta Vordonisi (Ĉiela-Vordonisi), Solida Vordonisi (Tera-Vordonisi) kaj Lava Vordonisi (Profunda-Vordonisi). La hodiaŭa tera civilizato, objekto kaj spaco, kaj la vivantaj specioj, kiujn vi konas, formiĝis de ĉi tiu historio.

Ĉi tio estas nur antaŭparolo. Mia vorto devenas el la malplenaĵo de tiu tempo, kiam via voĉo kaj esprimo ankoraŭ ne estis vorto, el la formoj, kiuj sin desegnis ene de tiu malplenaĵo, el la vibradoj, kiujn vi ne konis, ne vidis, sed sentis per tiu praa estaĵo ene de vi.

Nun, ĉiunokte la giganta heliko ĉe la fundo de la ŝrumpita insulo flustras ĉi tiun historion al miaj oreloj, iom post iom. Kaj mi rakontos ĝin al vi pecon post peco, tiom ajn, kiom ajn mia lango sukcesos... Scienco, legendo, mitologio, kredo estas la fikcioj de la limigita vivo de homo. Ĉiuj estas provizoraj, sed VORDONISI ESTAS REALA.

Do via orelo estu ĉe mi! Por aŭskulti tion venontfoje...

KONURALP, POETO DE VORDONISI

La Eta Strategiisto

Vespere en la 15-a de aŭgusto 2018, ĉirkaŭ pli ol la dekoka, en unu ĉambraro de Dombloko-Jiuyang, Songjiang-kvartalo, Ŝanhajo, Ĉinio, troviĝas avo, avino, filo kaj nepeto 1.5 jaraĝa ĉirkaŭe. La filo sin preparas por bani la knabeton, kiu staras en plasta banujo tien kaj ĉi tien moviĝante sen eĉ paŭzeto, kaj la geavoj atenteme gardas kaj zorgas apudside por ke ne okazu malbonaĵo al la nepeto.

Post iom da tempo, la knabeto ekludas sian bantukon kiel ludilon. Unue li alte levas la tukon per manparo kaj pretas ĝin forĵeti turnante okulojn fiksrigardajn al la avino. Subite li ĵetas la tukon al la planko, tamen la tuko estas kaptita de la avino dum la

verkis kaj sendis Gajo el Ĉinio

flugado en aero, kaj la nepeto ne submetiĝas al la malsukceso kaj reprenas la tukon el la mano de la avino kun petolema rideto. Li refoje levas la tukon, rigardante la avinon kaj ĝin forĵetas, kaj la avino refoje ĝin kaptas en aero! Post tri fojoj li denove levas la tukon, kun ruzema rigardo jen al la avino jen al la planko kiel antaŭe, ĵetonte li sin iom levas piedpinte supren, la avino streĉas sian atenton al lia movado, ĉimomente li tuj ekturnas sin kaj forĵetas la tukon al alia flanko, kaj la tuko falis sur la plankon! La avino ne sukcesis ĝin kapti! La nepeto tuj eksplodas je rido "hahah..." Li tre ĝojas pro sia venko en la ludado



kun sia avino! Li tre ĝojas pro sia sukcesa artifiko, ke oni afektas celi tion sed fakte alion!

Tiam la avino elbuŝuigas: "Ho, kia ruza uleto!" kun embaraseta rideto pro surprizo kaj malsukceso, sekve ŝi devas depreni la tukon por purigo.

Jes, nun vi certe rimarkis, ke la avo estas mi, olda Gajo Li Ĉuanhua, la avino mia edzino, la filo nia solfilo, kaj la petolema knabeto estas nia nepeto Li Zijun de

nur unu kaj duona jaroj.

Kvazaŭ palpebrumo, pasis jam pli ol tri jaroj! Pro la damninda pandemio ni ne povas viziti ilin en Ŝanhajo, tamen la supra sceno ankoraŭ ofte prezentiĝas en mia kapo, nun mi notas ĝin en mia komputero por ajntempa legado.

verkis kaj sendis **Gajo** el Ĉinio en 2021/12/23

Kataj Historioj

verkis kaj sendis Elena Popova el Bulgario

4. KATO SUR ANASA BOATO

Kato kun ruza fizionomio, pensas: "Mi ne ŝatas la akvon, sed kia plezuro estas trovi boaton! Mi naĝas, mi rigardas la mondon... Eĉ mi povas vidi kaj kapti iun neatentan fiŝon... La rivero estas tiel granda kaj unuafoje mi ne timas."

- Dankon, kara anaso, pri la bela promenado! Estu viva! – diris fine la kato.



5. MUZIKAMANTO

La Kato ŝatas ludi diversajn muzikinstrumentojn. Nun ĝi ludas fluton.

- Ĉu vi estas muzikanto?
- Ne mi ankiraŭ sin lernas!
- Ĉu ne estas malfacile?
- Ne, Mi ŝatas muziki!
- Bonege, la muziko helpas al ĉiu, ne nur pri amuzo! – gratulis ĝin iu turisto, kiu ankaŭ ŝatas ludi.



6. EN AŬSTRALIO

La Kato ŝatas vojaĝi. Iam li vizitis Aŭstralion kaj kion ĝi aĉetis – kompreneble tiun interesan muzikilon. "Tiu kato ŝatas muziki diversajn instrumentojn. Ĉu ĝi iĝos musikanto?" – demandis sin la turisto.

- Mi okupas kun diversajn muzikinstrumentojn, sed tiu- ĉi estas nekonata pri mi kaj pro tio estas interesa. Mi muzikas kun ĝojo.
- Ne gravas se vi ne iĝos profesia muzikanto, pli grave estas, ke vi ne perdas tempon, sed ĉiam lernas ion novan. Sukceson, kara Kato!



(daŭrigota)

verkis kaj sendis **Elena Popova** el Bulgario,

la bildojn desegnis **Hori Jasuo** el Japanio



"HRISTO GOROV-HRIMA" – 2022

-- anonco

INTERNACIA LITERATURA ESPERANTA KONKURSO

"HRISTO GOROV-HRIMA" – 2022

Hristo Gorov – Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto.

Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso estos por rakonto kaj eseo.

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkitaj en Esperanto. La

konkurso ne havas konkretan temon. La verkoj estu tajpitaj komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu Esperantan alfabeton per supersignoj. La aŭtoroj indiku sian sekson (inan aŭ viran). La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, estu plena poŝtadreso, telefono kaj interretadreso. La rakontoj kaj eseoj estu maksimume 3-paĝaj, formato A4, la literoj estu Times New Roman - 12 punktaj

La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la **31-a de oktobro 2022** al adreso: e-mail: **modest@abv.bg** aŭ per la poŝto al adreso: **Georgi Mihalkov, Sofio – 1229, "Vrabnica" 1, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario**

Mi vidis lin veni malproksime, ruĝeta kun grandaj plendorelaj kaj belaj saĝaj okuloj rigardantaj en la spacon. Sed ĝi apenaŭ povis rimarki la moviĝantajn homojn, la kolomboj priplukantaj la panerojn ĵetitajn sur la teron. Ĝi eĉ ne zorgis pri la bruo ĉirkaŭ ĝi. Bela hundo estis ĝi, Cocker Spaniel-raso.

Ĝi haltis antaŭ mi, sed ne kurbigis sur la benko. Ĝi levis hundosian ruĝan kapon, rigardis min, kaj fajrero ekbrilis en liaj malĝojaj okuloj. Mi etendis la manon por karesi ĝin. Ĝi ne retiriĝis.

Ni renkontis lian mastron en ne tre agrablaj cirkonstancoj kaj ne en agrabla etoso. Li estis en la hospitalo.

Mi havis koratakon, kiun la kuracistoj rapide sukcesis. Kaj li diris, ke lia diagnozo estas miokardia infarkto. Kaj la teamo de kuracistoj helpis lin ellitiĝi. Ni renkontiĝis en la koridoro, kie ni faris niajn ĉiutagajn resanigajn promenadojn.

Estis posttagmezo. Mi denove promenis. Post cent paŝoj, mi sidiĝis sur la benkon por ripozi. Mi ne volis reiri al la ĉambro, kie de frua mateno ĝis malfrua vespero la televida ekrano brilis kaj surradiis la litajn pacientojn.

- Ĉu ĝi estas senpaga? Li demandis, kaj sidiĝis apud mi sen atendi mian kapjeson, - Ni renkontiĝu, - daŭrigis li, kaj rapide parolis sian nomon. Mi ne bone aŭdis lian nomon, pro tio mi nomis lin "Li". Mi gestis al li kaj vokis mian nomon.

- Nia konato okazas en strangaj cirkonstancoj, - mi diris ridetante, kaj aldonis, - sed la sorto tiel ordigis nin."

- Nia urbo ne estas tre granda, sed ĉi tie ni devis renkontiĝi. - sonis lian basvoĉon.

Li estis viro en la aĝo de sepdek jaroj. Liaj trajtoj kaj sinteno montris, ke li iam estis bela kaj eleganta. Li estis ankoraŭ sufiĉe simpatia, nur kie la doloro markis liajn okulojn.

- Mi ne demandis, ĉu vi estas el la urbo?

Mi kapjesis aprobe, aldonante, - La mondo ne estas tiel granda."

Kaj kiel kutime okazas, nia konversacio komenciĝis per la kialoj de nia restado ĉi tie en la hospitalo. Tiel mi lernis lian historion.

Li havis feliĉan geedzecon. La ĝojo de la familio estis ankaŭ ilia bela kaj inteligenta filino, kiu daŭrigis sian edukadon eksterlande, sed ne revenis. Ŝi trovis sian feliĉon aliloke. Ŝi estigis familion tie kaj estis fervora, ke ŝi ne revenos. Ili komprenis ŝin, eĉ subtenis ŝin. Ŝi vokis ilin, sed malpli kaj malpli ofte venis tiu laboro, familia prizorgo pliiĝis. Ili havis du nepojn, knabon kaj knabinon, sed malofte oni vidis ilin. Ilia konekto estis per Skajpo kiam ili estis malgrandaj. Nun

ili kreskis kaj la intereso estis malsamaj.

Li haltis por ripozi kaj demandis min, ĉu mi enuas pri ĉi tio, por ni bulgarioj, banala historio. Vidante en miaj okuloj scivolemon daŭrigis:



"Mia edzino kaj mi loĝis en mia hereda domo preskaŭ en la urbocentro." Lu urba plano zorgis pri malkonstruo de la malnovaj konstruaĵoj kaj konstruado de novaj hejmoj. Investantoj venis kaj promesis al ni, ke ni ricevos apartamenton en la nova konstruaĵo. La kompenson, kiun ni ricevis por la domo, ni donis anticipe por la nova hejmo. Ni ne plu havis. Mi ŝatis ĉi tiun domon, asociitan kun multaj memoroj, kun mia infanaĝo. Sed la vivo ŝanĝiĝas, kaj niaj destinoj dependas de la tempo.

- Ĉu vi ricevis hejmon! Mi rapidis demandi.

- Post la eksproprietigo, ili komencis malkonstrui ĝin. Ili ne atingis nin, kiam okazis io, kio konfuzis niajn vivojn por ĉiam. La kompanianoj de la nova konstruo kverelis pri nereguligita konton kaj la rezulto venis per la murdo de unu el ili. Tiu, al kiu ni donis la monon kaj promesis konstrui al ni apartamenton. Ni restis sur la strato. Mia edzino malsaniĝis. Li havis malsanan koron kaj foriris rapide. Mi restis sola, en nia malnova domo, sed ĉiutage mi atendis esti devigita forlasi la loĝejon. Kaj tiu tago venis. Mi kolektis tion, kion mi plej bezonis, ĉar la komunumo lokis min preskaŭ rande de la urbo, en iuj forlasitaj dormejoj kun komunaj servĉambroj kaj malbona akvoprovizado. Mi akceptis. Mi ne havis elekton. Kaj tiel mi loĝis kun nia hundido, kiun ni prenis antaŭ kvar jaroj. Li estis mia amiko en soleco, kaj mia helpanto. Mia pensio ne estis granda, kiel preskaŭ ĉiuj bulgarioj, sed por Koki, kiel ni nomis ĝin, ĉiam estis manĝaĵo. Mi ricevis altan sangopremon pro la zorgoj ĉirkaŭ la loĝejo kaj la senespereco.

Mi ne diris al mia filino, ke ŝi ekzedziĝis kaj nun ŝi devis zorgi pri la infanoj kaj ŝi mem. Mi ne volis ĝeni ŝin. Kaj ŝiaj problemoj ne estis malgrandaj. Mi devas zorgi pri si mem. Sed unu afero pensas kaj alia okazas. Mi ludis multajn sportojn kiam mi estis juna, sed mi jam ĉion neglektis. Kaj la rompita, iam maldekstra kruro, kaŭzis al mi problemojn, sekve de tio mi senmoviĝis. Dank 'al Dio, ke vendejo estis proksime kaj la apoteko ne estis malproksime. Mi kunprenis Koki kaj ni butikumis. Foje, kiam mi ne fartis bone, mi skribis noton kaj metis ĝin sur la kolon de Koki kaj sendis ĝin al la apoteko. Ĝi komprenis min. La apotekistino estis tre afabla kaj bona virino. Li sendis al mi la medikamenton per Koki, kaj kiam mi ricevis mian pension, mi pagis. Tiel pasis la tagoj. Iun matenon mi eliris al la freŝa aero por preni miajn vestojn. Mi ne

memoras, kio okazis. Mi vekigis ĉi tie en la hospitalo.

"Kaj kio okazis?" - Mia scivolemo kreskis.

- Mi falis sur la terason. Koki vidis min kaj komencis treni min en la ĉambron. Al la lito. Li demetis la tablotukon kaj faldis min. Poste li malfermis la enirpordon, li povis fari tion, kaj iris al la apoteko. Surprizite, ke mi nenion mendis, apotekistino pensis, ke la noto estas perdita. Sed Koki komencis laŭte boji kaj grati ĉe la vendotablo. Estis multaj homoj kaj la apotekistino ne havis tempon pritrakti ĝin. Ŝi petis unu el la klientoj elpreni la hundon. Koki rezistis kaj bojis malespere. Ĝi estis enŝlosita, sed la hundeto frapfermis la pordon kaj bojis. La apotekistino suspektis kaj petis la klientojn eliri kaj sekvis Koki. Ŝi trovis min sur la planko. La ambulanco venis rapide. Tiel mia Koki savis min. Kaj ĉu vi scias, kie li estas nun? Antaŭ la hospitalo. La apotekistino diris al mi, kiam ŝi venis vidi min.

Nia amikeco, kiu komenciĝis en la hospitala koridoro, daŭris post kiam ni foriris kun pli bona sano. Montriĝis, ke ni loĝas en la sama kvartalo. Ni komencis renkontiĝi, en la kvartala ĝardeno, preskaŭ ĉiun posttagmezon. Ni parolis pri kiuj legis kion, kian muzikon ili aŭskultis aŭ spektis televidon. Malsanoj estis tabuaj. Kaj tiel ĝis la aŭtuno, kiam Li komencis veni ĉiam malpli. Mi ne demandis lin, kio okazas, kial li diluas niajn kunvenojn, kaj li ne diris al mi. Koki estis ĉiam kun li. Ĝi kurbigis sub la benko kaj ŝajnis aŭskulti kun intereso niajn konversaciojn. Unu tuta semajno ne venis. Mi ekbedaŭris, kial mi ne demandis lin, kie li loĝas. Ni eĉ ne interŝanĝis telefonnumerojn

Estis la komenco de novembro, ankoraŭ varma kaj agrabla por promenoj. Mi sidis sur nia benko por ĝui la specifan aromon de la florantaj krizantemoj, la ankoraŭ florantaj rozoj, la multkoloron de la nove plantitaj violoj. Ĝoji pri la paseroj, kiuj sentime bekpikis sub la benkojn por kelkaj paneroj, pri la patrinoj kaj la bruoj de la infanoj, ĝuante la varman novan tagon.

Miaj pensoj turniĝis denove al mia amiko kaj lia mistera malapero.

"Ĉu li vizitis sian filinon", estis la unua demando, kiun mi malakceptis. Li diris al mi, ke ŝi proponis iri al ŝi, sed li hezitis. En tiuj jaroj, en fremda lando, li ne sciis la lingvon, sed ankaŭ kiel li eltenos sur la stratoj sole.

"Ne, li ne foriris! Li dirus al mi!" Mi pensis, sed io streĉiĝis en mia gorĝo. Mi vidis Koki veni malproksime. Sola. Ĝi apenaŭ povis treni sin. Ĝia kapo kliniĝis kaj ĝiaj belaj oreloj tuŝis la teron. De tempo al tempo ĝi haltis, kvazaŭ serĉante ion aŭ iun. Poste ĝi denove foriris. Malrapide, kvazaŭ portante grandegan ŝarĝon sur la dorso. Mi volis ekstar, renkonti ĝin, sed io premis min kontraŭ la benkon. Miaj okuloj malklariĝis.

Mi pensis, ke mi haluciniĝas. Mi frotis ĝin. Mi vidis Koki denove, ankoraŭ tie komence de la vojo. Ĝi venis! Malrapide, sen ĉirkaŭrigardi. Estis kvazaŭ la tempo haltis. Sed Koki promenis, marŝis al nia benko. Mi atendis kaj havis nur unu demandon en mia kapo: "Ĉu vere?"

Ĝi venis. Ĝi ne kurbigis al la benko. Ĝi haltis antaŭ mi. Koki rektigis sian ruĝan kapon, fermis siajn belajn okulojn, kaj turnis siajn demandajn okulojn al mi. Mi tuŝis ĝian muzelon per tremanta mano. Ĝi lekis min, poste malrapide premis mian kruron. Mi sentis ĝin tremadi, kaj estis profunda malĝojo en liaj okuloj. Mi ne demandis ĝin, kie Li estas. Mi jam sciis. Do ni estis deprimitaj. Ĉiu kun sia malĝojo. Mi ekstaris malrapide por ne vundi lin. Koki ankaŭ ekstaris. Mi marŝis malrapide laŭ la vojo, sed mi sentis, ke Koki sekvas min. Mi kliniĝis kaj forte premis ĝin al mia brusto. Mi sentis ĝian kapon sur mia ŝultro.

De tiam ni estas kunel!

verkis kaj sendis **Ivaniĉka Madĝarova**
el Razgrad, Bulgario

Blankaj februaraj floroj

La sunleviĝo... La aŭroro...
Staras piceoj, kvazaŭ virinoj
Graciaj, sveltaj
Kun brakoj plenaj de la neĝo,
Kiel de ŝaŭmo flora
Kaj dum la hor' aŭrora
Radioj de sunlumo oraj
Rebrilas en piceaj blankaj floroj.

En la profundo de la koro
Revivas preterinta la doloro
El pasinteco jam tre fora;
Sed ĝi rebrilas
Fabele bele
Per la sunlumo perla
En puraj, blankaj
Februaraj floroj.

verkis kaj sendis **Antanas Vaitkevičius** el Litovio



5>> kun mia familio, mi renkontas miajn proprajn filmojn.



Kompreneble, mi ne ŝanĝas la kanalon, sed mia tuta koncentriĝo estas pri la temo de la filmo. lo Meryll, pentristino kiu pentras malĝustaĵo okazis ĉi tie, kiel kial la viro tiom koleras ktp. Alie, mi neniam enkaptiĝas en aferoj kiel mi pli bone estu roli tiele kaj mia vizaĝo aspekti tiele ktp. Ankaŭ, estas tiom da falsaj novaĵoj pri mi en Guglo! Mi

ŝatus havi la ŝancon forigi ilin ĉiujn! Sed mi ankaŭ ne plu legas ilin.”

Meryll; malvarmema, malgajninta, hontema, ekscitita, maltrankvila, aroganta, ribelema, erotika, amuza... Do, ĉiuj koloroj de la kanvaso nomata homoj! Meryll, pentristino kiu pentras aliajn kolorojn en si, unu el la plej respektataj aktorinoj de la epoko, daŭre ludu kun sano ĝis la fino de via vivo!

verkis kaj sendis **Konuralp Sunal**



27-a de januaro 2022

Büyükkada insulo – Istanbul

Du Eraroj

Jaro estas monato konata kiel plej longa ol ĉiuj aliaj dek du, en la jaro . Kompreneble, tion diras nur dommastrinoj kaj emerituloj. Estas konate, ke ili ĉiam kalkulas kiel oni kunligu la komencon de la monato kun la fino.kaj ĉio okazas pro elspezoj dum novjara festo, poste pro kristnaskaj tradiciaj festotagoj, kaj kiel ŝaŭmon sur torto sekvas du grandaj tradiciaj festoj diaanoncado kaj la familiakrucofestoj sankta jovan. Kaj dum la festado homoj vizitas siajn proksimulojn, ekscias novaĵojn, ekkonas novnaskitojn ene de familio kaj libertempe amuziĝas.

Mi jam verkis pri mia bofrato Petar, kiun ĉiuj konas kiel bonegan konanton de fungoj.

“Petar, mi petas vin, rakontu al mi kio okazis dum via aŭgusta fungoserĉado!” mi preskaŭ ĝene petis lin ne haltigante de mia ideo, ke mi ĉi-foje insiste ricevu la deziratan rakonton. Kaj li komencis rakonti...

“Estis varma tago. Eble, mezo de aŭgusto. Ekstera temperaturo estis alta, do estis sufoke por enspiri, precipe se oni jam piediradis pli ol du horojn trapasinte pli ol kvar kilometrojn. Nenie mi vidis fungojn. Mi eksidiĝis sur ŝtipeto por iomete ripozi miajn kruojn. Ellasis mi, la dorsosaketon elmane, forgesinte, ke en ĝi mi enmetis la vitran botelon de akvo. Feliĉe ĝi nur malakre falis sur la grundon sed la botelo restis ne rompita, kaj mia akvo savita.

Mi turniĝis ĉirkaŭe serĉante per rigardo kie mi

verkis kaj sendis Jandranka Miriĉ el Serbio


troviĝis. Ja, vere mi ŝovis mian nazon al tero serĉante fungojn kaj mi ne rimarkis, ke mi alproksimiĝis al ŝtatolimo de niaj najbaroj, bulgaroj...

Mi devis esti pli atentema, ĉar mi ne havas pasporton ĉe mi. Ja ĉiuj scias, kiel doganistoj estas akurataj laborante ĉiel laŭ leĝo, ekpensis mi malsere..

Tiam mi ekvidis ĉevalon. Vidalvide de mi staris la paŝtanta brunhara ĉevalo. Kviete mi alproksimiĝis al la ĉevalo esperante, ke mi ekvidos la mastron de la ĉevalo. La mastro de la ĉevalo kuŝis sur la bele ornamita teksaĵo. Li tuj leviĝis kiam li ekvidis min. Ni forte brakumis unu la alian. Nome, mi momente rekonis la homon. Tu estis mia onklo loĝanta en la vilaĝeto troviĝanta du kilometrojn de tie. Ni rapide babilis pri ĉio kaj pri mia ekiro trovi manĝeblajn fungojn.

Li mansignis al mi montrante al la granda griza ŝtonego apud kiu troviĝis arbo. “Jen, tien, iru kaj vi trovos la fungojn. Mi vidis, ke tie vere, troviĝas kelkaj fungoj. Ili estas vere grandaj fungoj.” Diris mia onklo manpremanie mian manon kaj per la dua tirante la ŝnuron ligita ĉirkaŭ la ĉevalokolon. Li foriris fajfante iun konatan melodion, sed mi jam koncentriĝis sur la granda ŝtono, kie troviĝis la fungoj.

Mi ne kredis, ke min mia onklo moke tropmu. Do, mi ekpaŝis kaj kuregis al la griza ŝtono. Veninte sur la



lokon, mi estis surprizita ĉar tie mi trovis ne nur rikoltitajn sed ankaŭ disĵetitajn fungojn en la ĉirkaŭaĵo ne pli ol metron antaŭ mi. Ja, iu rikoltis ilin mane. Iliaj trunkoj estis rompitaĵoj, tamen bonaspektaj. Certe, la fungoj estas manĝeblaj, ekpensis mi ekzamenite ilin en la manoj. Kial la rikoltanto forĵetis ilin?

Baldaŭ mi trovis la respondon. Sur la arbo troviĝis vespejo. Ja, estas du minutoj sufiĉaj por kompreni kio okazos se mi maltrankviligis la vespejon. Estis malfrue decidi kiun direkton mi ekkuru. La arego de vespoj konfuzite disflugis. Mi ankaŭ. Satkuris mi zigzage sed ili zumege akompanis min. Mi sentis kelkajn pikilojn sur brakoj. Mia ĉemizo estis kun longmanuoj tamem la furiozaj vespoj dolore pikadis min. Forkurante de furiozaj vespoj mi reatingis la doganon. Vidinte, ke min akompanas furiozigaj vespoj la doganisto lasis min kaŝi sin en doganejo.

Dume la alia doganisto direktigis ilin al ĵus

rompita granda akvomelono metinta sur la pendantan branĉon simile al birdonesto.

Dankante al la doganistoj, kiuj savis min de vespoj mi ne havis grandan turmenton pro alergio je vespoj sed mi devis ĉi-tien tranokti kaj morgaŭ venigi mian amikon por doni al mi pasporton kaj pagi la punon ĉar mi kontraŭ leĝe trapasis la ŝtatlimon.

“Ĉio laŭ leĝo!” diris mia bofrato, ride fininte la rakonton.

“Jes, sed vi faris du grandajn erarojn. La unua estas, ke vi devis atente esplori terenon ne ŝovinte la nazon teren kiel vi faris. La dua estis, ke oni ne moviĝu en la okazo de vespoatako” diris mi, moral instrue.

verkis **Miriĉ Jadranka** el Serbio
laŭ la rakonto de ŝia bofrato Petar.
la 25-an de januaro 2014

Italio kaj Vi

Ili estis du aŭreoloj,
kiuj ornamis Italion,
tiu-nokte.
Unu de la luno
ŝvebanta sur gotikaj katedraloj.
La alia de vi,
reflektanta el la spegulo de Atena.

Ili estis du prizonuloj,
ekzilitaj en Italio,
kiam vi venis.
La unua, la tempo najlita en mia
koro
dum mia tuta vivo.
La alia, la mallumo influanta
la tutan mondon.

Ili estis du kronoj,
regantaj super Italio,
ekde tiam.

La unua apartenis al via beleco,
valoranta al unikaj rubenoj.
La alia, apartenis al mi,
la princo de la lumo.

Ili estis du movetiĝoj,
aperantaj en Italio,
tiu-nokte.

La unua, apartenis al la ĝojo
de nia kuniĝo.
La alia, apartenis al la konstelacioj
de Perseo kaj Andromedo.

Ni estis en gondolo
kune kun vi en Venecio,
Ni estis du zodiakoj,
tiu-nokte en la ĉielo,
ni estis kune ĝiseterne,
tiu-tage kaj en la estonteco.

verkis kaj sendis Sedat Han el Turkio

Kvankam mi ne scias kiel klarigi
tion,
vi estas alie bela,
en mia revo en Venecio.

verkis kaj sendis **Sedat Han**
el Turkio
en turka lingvo 02.07.1994
esperantigita 26.12.2021



32>> supraj korpopartoj. Plezurplena kaj timiga estis ĉifoje la malnova Buĉejo. Oni devis hurli.

Kaj ni hurlis gorĝostreĉante, la buĉejo reeĥis, ĉio estis brulruĝa, eĉ niaj dentoj, kvazaŭ ni manĝus nekuiritan viandon. Ni frapadis la trabojn, balanciĝis supre. Tiel ni hurlis.

Fonto: Legolibreto 2 de Jindřiška
Drahotova



Solvo de la krucvortenigmo

| | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| N | O | N | A | R | U | | O | T | I | H | A |
| O | N | O | K | I | | O | I | E | R | O | K |
| N | A | R | O | | O | N | R | I | F | | I |
| I | M | A | | S | I | R | U | K | | O | L |
| E | V | | O | I | R | E | F | | I | R | P |
| F | | O | B | R | A | B | | U | V | O | M |
| V | N | I | R | I | V | | O | N | V | M | O |
| K | E | D | U | D | | O | T | U | B | V | K |

El la libro: Paŝoj al plena posedo - William Auld "La Psalmaro"

Kiam Anna-Klara en sia sepa jaro vizitadis la unuan klason, iun tagon ŝi petis de mi psalmilbron.

„Kial?“ mi demandis.

„Ĉar ankaŭ Gustavo havas.“

„Povas esti, sed mi neniam aŭdis, ke tiel etaj knabinoj havus psalmaron.“

„Sed ankaŭ Gustavo havas.“

Kion fari? Mi iris aĉeti psalmaron.

Mi trovis multe da diversaj psalmilbroj, malgrandajn, belajn librojn kun mola bindo, orkadraj paĝoj kaj ankaŭ grandajn librojn kun belaj, simplaj literoj. Mi aĉetis, kiu estis malplej kosta, por ke infano bontempe lernu la ŝparemon, precipe en tiaj seriozaj aferoj.

Mi skribis la nomon de Anna-Klara en la libron kaj posttagmeze transdonis ĝin al ŝi. Ŝi ege ekĝojis, prenis la libron kaj diris: „Ĝi estas ĝuste tia, kia tiu de Gustavo.“

Mi eksidis kaj iomete meditis pri la okazintaĵoj, kaj poste – la dioj pardonu min – mi iris al la pordo kaj enokulumis tra la ŝlosiltruo.

Anna-Klara staris meze de la ĉambro, antaŭ la granda spegulo. Kun la malfermita psalmaro ŝi kantis falsvoĉe. De tempo al tempo ŝi rigardis al la spegulo, ĉu ŝia zono bone kuŝas? Kelkfoje ŝi ordigis sian harplekton, kelkfoje glatigis ĉifon sur la robo, kiu ne estis bonorde sur ŝia ŝultro.

Subite mi surprizis ŝin per pordmalfermo kaj eniris: „Kara Anna-Klara,“ mi diris, „psalmaro estas io multe pli serioza, ol vi imagas. Oni ne staras antaŭ spegulo por kanti el psalmaro. La psalmilbro ne estas por ludi per ĝi. Kiam vi estos pli aĝa, la instruist-onklino klarigos al vi, kio estas esence psalmaro.“

Anna-Klara sidis serioza kaj silenta. Ŝi rigardis sincere al mi kaj decidvoĉe diris: „Mi volas diri al vi nur unu aferon: Oni ne eniras ĉambron antaŭ ol frapi.“

Mi ne kredas, ke Anna-Klara estas jam matura por religiaj problemoj.

El la libro „La kormoranoj ancoruĝ ne revenis“

„Vi povas veni kun ni, se vi volas,“ diris mi. „Sed ni rapidu, ĉar baldaŭ komenciĝos sunsubiro.“

J.Burai eĉ nun ne komprenis, pri kio temas, tamen li akompanis nin. Ni iris reen apud la rivero.

Malantaŭ la fragmitaro ekflugis birdoj de la akvospegulo, svarme ili traflugis super niaj kapoj, aernaĝis al la kampoj plenigi la kropojn. Ni plirapidigis niajn paŝojn. La sundisko okcidente jam malheliĝis, baldaŭ ĝi ruĝiĝos. Fine ni eĉ kuris.



Antaŭ la Buĉejo atendis nin Aranjo Bognár. Ŝiaj okuloj estis ŝvelintaj, estis videble, ke ŝi ploris. Sed ŝia vizaĝo gajiĝis ekvidinte nin. Ŝi eĉ kuris renkonte al ni.

„Ĉu vi lavis la murojn?“ demandis mi.

„Mi lavis ilin,“ respondis ŝi malgaje. „Devigis min la onklo.“

Laŭpove ni klopodis konsoli ŝin.

„Ne ĉagreniĝu,“ diris al ŝi Oskaro Hodonicki. „Pli frue aŭ pli poste murdos vian onklon apopleksio. Ĉi tie li elspiros en la centro de la Buĉejo.“

„Eble jam la venontan dimanĉon,“ diris mi.

Ni eniris la grandan ŝtonan konstruaĵon. La ruĝaj muroj bele, pure lavitaj atendis nin. J.Burai scivoleme rigardis, eĉ palpatis la muron.

„Ĉu ĉi tie estis buĉejo?“ demandis li.

„Ĝi estis buĉejo,“ diris mi. „Oni buĉis multajn bestojn ĉi tie.“

„Kiajn bestojn?“

„Ŝafojn, bovojn, ĉevalojn, porkojn,“ diris mi.

„La muroj aspektas esti sangaj,“ diris J.Burai.

„Eble ili estas ĝuste sangaj,“ diris mi. „Eble la sango farbis ilin ruĝe.“

„Multe pli belaj estas muroj plendeseĝnitaj,“ diris Oskaro Hodonicki.

„Sed la Ĉardomastro ĉiudimanĉe forlavigas niajn desegnaĵojn.“

„Vi ne devus forlavi la desegnaĵojn,“ diris J.Burai.

„Aranjo devas forlavi,“ diris mi. „La Ĉardomastro estas ŝia onklo, kaj li estas riĉulo.“

„Ĉiun dimanĉon mi forlavas la desegnaĵojn,“ diris Aranjo.

„Ĉu vi nun volas hurlti pro tio?“ demandis J.Burai.

„Ne pro tio,“ diris mi. „Grimpu ni sur la trabojn. Tuj vi vidos, kial ni hurlas.“

Ni kaptis la rustajn ferhokojn kaj grimpis sur la dikajn trabojn, okcidentflanke sub la vitrajn tegolojn. La sundisko jam ruĝiĝis malsupre, okcidente. La muroj de la Buĉejo komencis ardi, poste subite kvazaŭ flamon elĵetis. La malnova Buĉejo fandiĝis en flamo. Ardis, flamis niaj brakoj, piedoj, vizaĝoj kaj senvestigitaj

>>31

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:

Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds